



DUMONATA KULTURA INFORMILO KAJ ESPRIMILO

Redaktejo : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE

Abono en Eŭropo, 1992 : 60 FF. Ekstereŭropo : 80 FF

Ĝiri al : CERCLE AMICAL ESPERANTISTE DE L'AGENAIS

P&ck : 3371 74 M Bordeaux (mencii same sur bankĉekoj!)

**paĉjo,
kio estas
tio ?**



PAĈJO, KIO ESTAS TIO ?

Jen vi legis la nuran demandon, kiu ŝprucas el mia kapo nun, antaŭ ĉi evoluó konsistiganta la **novan mondordon** kaj la **finon de la Historio**. Komence (antaŭ du semajnoj) mi simple volis enkonduki debaton pri grava temo, kiu nun tuŝas la okcidentajn laboristojn : la novaj laborrilatoj, kiujn oni celas starigi imitante la japanan manieron dungi, produkti kaj pagi (aŭ perlabori, de la laborista vidpunkto). Sed nun, al kiu interesus tio? Ne al mi, almenaŭ ne tiel simple, ĉar tion ni ja povas rigardi en la kadro de la Revolucio de 1991, origino de la embaraso kiu min tenas gapanta, kvazaŭ nekredanta kion mi vidas.

Sed atentu, ne temas pri la okazaĵoj, ne ; ilin mi kapblas asimili, kiel ajn vertigodonaj ili estas. Ne gravas ĉu, kiam vi legas ĉi liniojn, la caro jam reigis en Ruslando, aŭ 500.000 homoj jam mortis en pogromoj ĉie tra Eŭropo ; ne, ne tio estas la kaŭzo de la paralizo de mia spirito. Kulpas nur la fonbruo, kiu ĉirkaŭas ĉion ĉi ; tiu glaciiganta voĉo, kies rekantaĵo ne ĉesas tamburi en oniaj oreloj, ĉu vi ne aŭdas ĝin? Ĉu eble ĝi nur min ĝenas? Ĉu nur ĉe mi, en Hispanio? Mi ŝatus ke oni respondu ĉi demandojn.

La kanzono estas simpla kaj facile parkerebla, kaj ĝi prikantas la kapitalismon ne pro tio ke ĝi venkis, sed tial ke nur ĝi ekzistas. La notoj de la kantado rapide efikis, ĉar ĉiuj ĝin kantas : unuj diras pardoneme "ni do pravis de antaŭ jarcento, de ĉiam", kaj ĝin kantas ; aliaj diras pardonpete "ni grave eraris", kaj ĝin kantas ; kaj kelkaj aliaj senkulpiĝe diris "ni ekvidis la eraron tuj post la murdo al Trocki, aŭ post la milito, aŭ post la invado de Hungario, aŭ post la **praga printempo**, aŭ..." kaj tuj poste ĝin ekkantis kaj plu kantas. Tiu unusona muziko ŝajnas ne havi konkurencon, ĉar la porkoj ĝin gruntas kaj la hundoj ĝin bojas kaj la azenoj ĝin blekas en perfekta ĥoro.

Eĉ se la aŭdkapablo ne bone funkcias, eblas per aliaj sensoj percepti ĉi tiun konservativan ondegon. Ĝi sin kaŝas sub la okazaĵoj, kiujn oni vidas surŝafte ; sed funde ĝi impete kaj balae antaŭeniras, eltirante ĉion, kion

ĉi jarcento alportis. La magmaj movoj, malrapidaj sed konstantaj, kiuj ĝis nun konsistigis la reakciajn puŝojn, iĝas nun vera tertremo, kiu draste malaperigis la grundon de sub niaj piedoj. Multaj el ni, la plimulto, falis sur la ruinojn, kiuj englutis multajn aliajn. Nur kelkaj eksaltis kaj flugis dirante : "la respondoj estis malĝustaj, sed la demandoj plu staras", sed ilia pepado estas ne sufiĉe laŭta kontraŭ la kanzono **leitmotiv** de la ĉi-jara revolucio.

Ne plu interesas serĉi la veron, ĉar ni ĵus trovis la plej okulfrapan malveron. Ties malpravo, ni konkludas komforte, pravigas tiujn, kiuj unue, dekomence, rifuzis ĝin. Ni do plu estas devigataj legi **La Kapitalon** de Marks ; antaŭe ĉar ĝi entenis la veron, kaj nun ĉar ĝi spegulas la malveron ; ŝanĝiĝis nur la voĉoj kiuj ĝin rekomendas.

Ĉu inter ekspluatado kaj ekspluatado ne estas alia vojo alirebla? Mi komprenas ke la respondo estas, eble, malfacila ; sed ĉu iu kapblas plu starigi antaŭ si ĉi demandon? Ŝajne neni, almenaŭ kiom mi konstatas : nun ekas debato en la Hispana Komunista Partio por dissolviĝo ; nu kial? Pri kio hontas la partio? Ĉu ĝi ne havas sufiĉe longan tradicion de lukto por la libereco? Ĉu ĝi ne antaŭlonge apartiĝis el la moskva disciplino? Kial do? Terure! La makulo de la nomo "Komunista" devigas ilin enterigi (enruinigi) sin kun la sovetiaj samnomuloj.

Tamen mia ĉefa klopodo ne estas la Komunista Partio, ne. Kion diri pri la socialistoj aŭ socialdemokratoj? Ĉu iu el vi aŭdas ilin? Ili tute silentas, sed kial? Kompatindaj! Ilia pragmatismo igis ilin akcepti la **feran kurtendon**, amikeme alproksimiĝi al la tiamaj popoldemokratioj kaj tiel ekigi certan **malfrostiĝon**. Ili ja ne estas komunistoj, sed ilia idearo tro proksimas, ĉu ne? Nun ili riskas esti traktataj same kiel la nazikunlaborantoj post la milito ; pro tio, por eviti ion, kion fari? Nur vidu ilin, arigantaj kun la ceteruloj en la longa vico por kisi la ringon de la episkopo, kaj poste, benite de la Sankta Kruco, defili sub la filtro de la nacia flago.

Kia revolucio, tia spektaklo. Kaj ĝi nur ĵus komenciĝis.

Henri CASTIAU :

La komunista reĝimo en Sovetio kaj ĝiaj satelitaj landoj jam apartenas al la historio. Ĉu la fiasko de la tiea politika kaj ekonomia sistemo signifas la venkon de kapitalismo? Ŝajnas al mi iom antaŭtempe, ke la subtenantoj de kapitalismo suprentiras la flagon de la venko.

La oportunismo de niaj politikistoj ne devus mirigi homojn pli-malpli klerajn pri la kutimoj de niaj politikaj moŝtoj. Tiuj ĉi, sen multe da konsciencaj maltrankviligaĵoj, emas adapti sin al la cirkonstancoj. Oni ja devas prizorgi sian karieron, ĉu ne?

Certe, kapitalismo havigas al malgranda parto de la homaro ian komforton. Sed, je kia prezo! La adicio estas peza por la tria mondo, kiu ĉiutage malriĉiĝas, kaj por la loĝantoj de la riĉaj landoj.

Pro la libera merkato, milionoj da homoj estas apenaŭ kapablaj teni sin vivantaj, infanamaso mortas pro malsato, forlasitaj etuloj devas sin prostitui ktp. Tiaj hontigaj okazaĵoj estas sufiĉe konataj, por ke mi ne daŭrigu la liston. Terure estas, ke ni ĉiuj individue respondecas pri tia fisituacio. Ni ĉiuj devas scii, ke frandante dikan, grasan, bongustan porkokotleton, ni eble senigas, ie en la tria mondo, tutan familion de ĝia unutaga panoporcio.

Ĉe ni, la libera entrepreno, sub la premo de la maldekstraj partioj, certe sukcesis doni al la laboristoj altan materian vivnivelon, sed tamen ne sukcesis feliĉigi la homojn. Nome, ĝi multekoste pagigas nin por tia trompa bona stato. Ĉion, kion ĝi donas per la dekstra mano, ĝi reprenas per la maldekstra, devigante nin al senlima konsumado, postulante de ni nehomajn altajn laborkadencojn, kreante kategorion de marĝenuloj, kiuj ne rajtas ricevi eĉ malgrandan porcion de la kuko.

Pako priraktas nur flankelementon de la konsekvencoj kiujn naŝkas la nuna situacio en la orienta Eŭropo. Tamen, li aludas plej gravan problemon. Mi citas: "Ĉu inter ekspluatado kaj ekspluatado ne estas alia vojo alirebla?" Kompreneble, tia vojo ekzistas. Jam multaj profetoj kaj filozofoj montris ĝin al ni. Sed ĝi postulas homojn, kiuj amas sian proksimumon kaj kies celo ne estas dikigi la saldon de sia bankokonto.

Ĉu tia homo iam ekzistos?

ETGE :

Ĉu komunismo malvenkis? Ĉu tio, kio estis ĝis antaŭnelonge en Sovetunio, estas komunismo? Ĉar mi neniam legis iun libron de Markso aŭ iun libron pri komunisma teorio, mi ne povas havi opinion pri tiuj demandoj. Sed neniam ŝajnis al mi, ke la politika-ekonomia sistemo de Sovetunio kaj ĝiaj satelitoj estis esence malsama ol tiu de Okcidenta Eŭropo. Kompreneble la registaroj estis eĉ malpli demokratiaj ol en la Okcident-Eŭropaj landoj, kiujn mi konas, sed mi ne vidis **esencan** diferencon sufiĉan por pravigi la propagandan vidpunkton pri ia kosma lukto inter Kapitalismo kaj Komunismo, inter Bono kaj Malbono. Ĉu la Okcidentaj ŝtatoj ne uzis la vorton "komunisto" tiel, kiel la nazioj uzis la vorton "judo", nur por mobilizi siajn ŝafarojn kontraŭ la eterne bezonata malamiko?

Ŝajnas, ke komunistoj nun ne plu taŭgas kiel malamiko. Ni devos nin rapide adapti al nova mondordo kaj novaj malamikoj. Ĉu eble la Japanoj taŭgas? Laŭ la Usona militistaro, jes. Oni jam verkis grandan raporton por la Usonaj politikistaro kaj publiko klarigante, kiel tiuj fiaj flavhaŭtaj Japanoj volas konkeri la tutan mondon laŭ tute malmorala ekonomia maniero, aĉetante ĉion ĉie. (Kial ili ne bruligas kaj enterigas vivaj siajn malamikojn kiel faras la bonaj Usonanoj - kaj Britoj kaj Francoj - en Irako? Tiam Usonanoj povus almenaŭ respekti ilin.)

La funda kaŭzo de kaj la Unua kaj la Dua Mondmilitoj estis la sama : Unu lando (aŭ grupo de landoj) ne havis politikan influon konvenan al ĝia ekonomia povo. Tio certe estos la kaŭzo ankaŭ de la Tria Mondmilito, kaj la antaŭsignoj estas jam videblaj. Post la Golfa milito, Kuvajto aperigis grandegajn reklamojn en la Usona gazetaro dankante ĉiujn landojn, kiuj kontribuis al la restarigo de ĝia (faŝisma) registaro. 30 landojn oni menciis, sed Japanujon oni tute forgesis, kvankam Japanujo per 9 miliardoj da dolaroj faris la plej grandan monkontribuon el ĉiuj landoj. (Laŭ tiu skalo Usono faris la plej malgrandan kontribuon, ĉar Usono faris ja netan profitigon per la milito. Sed kompreneble oni danku Usonon pro tio, ke Usono devigis la Japanojn pagi la militon.) Legu la artikolon sur paĝo 9 de MONATO 1991:5, se vi pensas, ke Japanujo eterne eltenos tiajn humiligajn kaj

ĉikanojn.

Ŝajnas do probable, ke la Tria Mondmilito estos inter Japanujo kaj Usono. Eŭropo estos kompreneble ĉe la Usona flanko. Koreujo laŭ ekonomikaj prognozoj tre riĉiĝos en la venontaj jardekoj kaj eble estos grava aliancano de Japanujo. Sovetunio? Eble ĝi estos ĉe la Usona flanko. Kiu scias?

Kion Esperantistoj povas fari kontraŭ la venonta milito? Pro miaj propraj spertoj kun Japanaj kaj Usonaj individuoj mi havas konklusion al la japana partio, sed kiel bona E-isto mi provos resti neŭtrala. Ni ne trompu nin pensante, ke ni povas ion fari por influi la kurson de historio; ni estas senpovaj partikuloj en la fluo de internacia politiko; "kiel akvo de l'rivero" ni estas. Kiam venos la milito inter Usono kaj Japanujo, Usonaj kaj Japanaj E-istoj sin reciproke malamos kaj anatemos, same kiel la Francaj kaj Germanaj E-istoj sin reciproke ekmalamis komence de la Unua kaj Dua Mondmilitoj, same kiel Kroataj kaj Serbaj E-istoj jam ĉesis interparoli kaj plenigas siajn bulterojn per propagando kontraŭ la alia partio.

Sed ni pensu antaŭe al la fino de la Tria Mondmilito. Tiam okazos Konferenco por Paco. UNO pereos dum la Tria, same kiel la Ligo de Nacioj pereis dum la Dua Mondmilito. Oni devos fondi novan internacian organizaĵon, kaj oni denove havos la okazon elekti kiel laborlingvon la solan lingvon, kiu povas esti la portanto de neŭtrala tuthomara kulturo kaj tiel malebligi la Kvaran Mondmiliton. Ni plievoluigu nian lingvon, por ke ĝi estu eĉ pli taŭga kandidato je tiu tempo. Ni laboru kaj esperu. (Sed ne pri paco, ĉar ĝis la Fina Venko tion ni certe ne ricevos.)

GAROLO :

AL LA AKTUALIGO DE NIA HOMKONFORMEKO

Paĉjo, kio estas tio?

Tre aktuala estas la demando de Fako (el la tuta stronga pakajo) en la 3a ĉeuletero de **Laŭte**. Mi jan

aŭdis ĝin, de miaj gefiloj kaj aliaj sub ĉiuj imagblaj formoj.

Nu, miaj karaj, la respondo estas tre facila, tio estas la rezulto de ĉiuj homaj malkongruoj sur la individuaj kaj sociaj kampoj de agadoj, kiuj akumuliĝis de la lastaj jardekoj kaj nun eksplodas kaj implodas sub formo de ĝenerala malevoluo. Estas la fiasko de la sistemoj (ĉiuj el ili) kiujn ni pretendis instali... ĉar jen la ideologioj sur kiuj ni fundamentis niajn sistemojn, estas idealaj, preskaŭ perfektaj sed ni tute ne. Ni, ankaŭ vi karaj gefiloj, estas pekoplennaj, malvirtaj, ĝuemaj, avidaj, spekul-emaj, nur tio estas la problemo, sed vere malfacile estas agnoski ĉi tion tiel simple, ĉu ne?

Resume pri la malevoluo

Estas malfacile en ĉeuletero, detale paroli pri nia malevoluo, kaj aktualigi, renovigi la homkonformajn valorojn kiuj kapablas plibonigi la ĝeneralan situacion de nia sociordo. Tiujn problemojn, mi, laŭ mia modesta kapablo sed kun mia tuta kutima konvinko, ĝuste traktis en ĵus eldonita libro "**Al la tero returne**", kiu estas je la dispozo de la SAT-brosŭrservo, mi do nur povas rekomendi ties legon al vi.

Post la analizo de la nuntempaj faktoj, en ĉiuj kampoj, post la konsidero de ĉiuj malkongruoj oni facile alvenas al la ĉefaj kaŭzoj de malevoluo, kiuj resume estas :

- Demografia eksplodo (ja ne konsciebla en Eŭropo... sed mi vivas en la tria mondo!) kun la konsekvenco analfabeteco, kiuj estigas mankon de adapto al la modernaj teknologioj kaj sciencaj konkeroj.

- Influo de la moderna mito = Kolektiveco (...kiun mi de jaroj denuncas kaj kontraŭstaras al liberecana, individueca sociordo, sociordo ekzempligita en la ĉi supre citita libro) kiu venigis la ekscesan ŝtatistimon, la komurismojn, la socialismojn. Kio induktas la homojn kiel individuojn al neakcepto de responso, de iniciato kaj kondukas al mallaboremo, al burokratismoj, al koruptaj nepotismoj.

- Stimulado de spekulado sub ĉiuj eblaj formoj ene de monkapitalismo, (estas nepre necese apartigi monkapitalismon disde labor Kapitalismo!) ene de ŝtatismoj kun parazitismo kaj, ree, eĉ de komunismoj, kio kondukas la homojn same al plia mallaboremo kaj al marginaj agadoj kiel ludado, vetado ĝis ŝtelado kaj pliaj krimoj, entute al atencoj al la individua respekto.

Komunismo ne mortis

Mi ĵus sendis artikolon kur. ĉi tiu titolo por "**Sennaciulo**" responde al artikolo de Petro Levi ("S-ulo" n°10, paĝo 94), mi ne ripetos ĝin nun sed por iom akompani la rezonon de Henri Castiau en ĉi tiu ĉenletero, kiu prave opinias, ke neniam oni klopodis konstrui veran komunismon en Sovetio, mi tamen devas rediri, ke tia sistemo ne estas aplikebla, ĉar ĝi supozigas ke la homoj estas perfektaj, kaj tiaj ili ja ne estas. Komunismo, same kiel Kristanismo, Budhismo k.a., kiel doktrino ankoraŭ longe postvivos pro la kredo pri la mito : ke la individuajn problemojn, la sociajn ordojn devas zorgi la kolektiveco... Mi ne plu komentos la aferon por eviti reĉagreniĝon mian : tiun pri la Levjatana ĉenletero!... la ŝtato!

La forgesitaj principoj de Markso

Tre interese estas ke en Brazilio oni ĵus reeldonis la centjaran libron "**Looking Backward**" de la fama Edward Bellamy, kiu estas la "biblio" de la abundanoj aŭ modernaj distribuistoj. Kompreneble la celo de la nuna eldono tute ne estas subteni ekzemple la laŭdindan agadon de K-do Jopo en "**Laŭte**", sed montri, ke se fakte Bellamy antaŭvidis la teknikajn, materialajn konkerojn de la homoj, li tute ne sukcesis aŭguri la etikan stagnon de la homaro kun la burokratismo, la koruptado k.m.a. Tio estas nur unu el la homaj malkongruoj pri kiuj mi aludis.

Ankoraŭ pli interesa en la libro de Bellamy estas la enkonduko de Eric Fromm en eldono de Nal. Penguin Inc. en 1960, kiu longe rememorigas kelkajn principojn de Markso nem, inter ili :

- Markso tute klare en sia vizio pri socialismo opinias, ke la ŝtato devas malaperi kaj ĝin anstataŭos asocio de individuoj, kie la kooperado estos spontanea.

- Markso neniam funde pensis pri la forigo (ja ne ebla) de la ekonomia malegaleco, sed pensis nur pri la plena emancipiĝo de la individuo ĝuste ĝis memstareco kaj kooperado (la nura formo de socialismo efektivebla kaj konstrua).

Mi ne kapblas diri ĉu tiuj principoj estas flanke de Markso aŭtentikaj ; se jes, mi estas marksisto kaj mi opinias, ke estas en ĉi tiu direkto, ke ni devas aktualigi niajn homajn valorojn por la konformeco al nia homa esenco. Mi persone nur tiel kapblas koncepti la socialismon... eĉ se temas pri anarkiismo... kaj jen ĉu ne temas pri la nura sistemo, kiun la homoj ankoraŭ ne kuraĝis globe iniciati? Kial ne? ... Ne respondu per moka rido!

La "Nova Ordo Internacia"

En la demando "Paĉjo, kio estas tio?", eble oni povas pensi pri la Nova Ordo Internacia, kiel tion faras malkviete ETGE. Ne estas dubo ke la perspektivoj pri tiu ordo komplikiĝas, sed mi persone malfacile kapblas imagi novan militon inter Japanio kaj Usono eĉ se la ekonomikaj motivoj estus pli ol sufiĉaj. Estas multe pli gravaj problemoj, kiuj povas malstabiligi nian planedon, cetere krom la idiotaj sintenoj de niaj karaj etnistoj, estas la demografia eksplodo de la tria mondo... la nova fundo de l'mizero, ekzemple. De longe la disfalo de sovetia komunismo estis antaŭvidita de multaj, ebla la disfalo de Sovetio kiel ŝtato estis pli malfacile konceptebla, almenaŭ en tiom rapida okazo, sed male al tio kion oni povas supozi tio ne tro multe ŝanĝas la novan ordon internacian.

Tre instrua pri tiu temo estas la portugallingva libro de Jacques P. de Brochard, triamondano el eŭropa kulturo, kiu skribis la libron "**La Miraĝo de la Futuro**" (Estonteco) pri la korupta rolo de la ŝtato kaj pri la nova ordo, divido de nia mondo en kvar

influzonoj laŭ la meridianoj, kiel tion faris la reg-
antoj de l'mondo en Traktato de Tordesillas en 1494.
La analogio estas logika = la influo de la dolaro
en tuta Ameriko, la influo de la ekuo por Eŭropo kaj
Afriko, la rublo en eks-Sovetio kaj Proksima Oriento
kaj la eno en Azio ĝuste kun Japanio.

Mi preferas la dividon de la nova ordo laŭ la ĵus
(malpli ol unu jaro) eldonita verko de Jean-Christo-
phe Ruffin "L'Empire et les Nouveaux Barbares" ("La
Imperio kaj la Novaj Barbaroj"), temas pri la divido
de nia mondo inter la nordo kaj la sudo, inter la
evoluo kaj la malevoluo, inter la demografia kontrolo
kaj la demografia eksplodo. Temas pri la invado de
hordoj da barbaroj el la sudo al la imperioj de la
nordo... procezo kiu cetere jam komenciĝis, se oni
konsideras la arasan migradon al Eŭropo fare de tria-
mndanoj, fenomeno kiu jam alportas multajn problem-
ojn en Eŭropo laŭ ĉiuj aspektoj, ekde sociaj adapt-
iĝoj ĝis rasismaj konfliktoj. Kompreneble, jen plia
fenomeno kiu estis tre facile antaŭvidebla ekde la
koloniepoko. Mi persone, en fikcio, vizitis tian "flu-
sor" antaŭ pli ol 10 jaroj, en mia libro "Satana An-
ĝelo", paĝo 200... kaj estas ĝuste antaŭ 10 jaroj,
ke la grava tutmonda malevoluo ekmanifestiĝis antaŭ
ol la veno de la "perestrojkoj" kiuj povis nur fiaski
plene.

Ja, nia pozitiva reago urĝas.

Tereza :

Kiel gravan kaj malfacilan temon enkondukas Pako!
ĉar mi neniam pritraktis la temon miakape aŭ konversa-
cie, sed pro malfacileco klarigi pensojn pri plektitaj afe-
roj. Post pluraj legadoj de la teksto baza, mi provos...

Mi naskiĝis en 1935, ĉiam interesiĝis pri politikaj
eventoj (eĉ dujara defilis antaŭ la "Mur des Fédérés").
Sed neniam vere politike aktivis. Kompreneble la pole-
mikoj pri la komunistaj landoj atentis min pri la temo.
Okaze de balotoj mi iomete paŝis kun la komunistoj de
mia urbeto, sed ĉiam kontraŭbatalis la grandan certecon
pri ilia nura praveco. Mi opinias ke homaj, ekonomiaj

problemoj estas malfacile regeblaj. Ili fontas el pluraj
kaŭzoj, interplektiĝas kaj sin modifas unu la alian. Do
ne eblas havi tro facilan solvon. Necesas ĉiam dubi por
eviti erari, ĉar homo estas homo, do erarema. La fido
al sampartiano mirigis min kaj ŝajnas al mi ke tiu troa
fido estas grava risko. Pli multaj konsideris peko la fak-
ton legi alian ĵurnalon kiel "Le Monde"...

Post legado de raporto en gazeto pri la malbonaj re-
zultoj de Soveta ekonomio, mi demandis min : "Ĉu do
necesas, ke homoj estu ekspluatataj de kapitalistoj por
ke ili pli efike laboru?" Tiu sinteno ĝenas min. Kiel
Pako mi opinias ke la kantado al Dio "Kapitalismo" es-
tas malĝusta, ĉar ĝi igas ankaŭ mizeron kaj maljust-
econ tra la mondo (eĉ se ofte ĝi ne estas pure kapital-
isma, pro sociaj leĝoj).

En 1976, kun komunisto amiko mi vizitis Sovetion
(Moskvon). Ni estis kritikemaj. Poste, dank'al esperanto,
mi renkontis sovetianojn, rumanojn, polojn, hungarojn,
ĉeĥojn, kiuj estis multe seniluziigitaj pri la reĝimo. Ili
estis vunditaj kaj forĵetis ĉion el la iama ŝatata idealo.

"Ĉu la respondoj estas malĝustaj kaj la demando plu
staras?", mi ne scias.

Ĉiu homo respondecas, ĝis la plej eta je sia mezuro,
ĉar tro fidi estas kulpo. Ĉiu devas sin rigardi, ne fidi
al la aliaj, partio, ŝtato, por konstrui sian feliĉon. Sed
ĉu, antaŭ la financmondo, eblas? Certe nun ni estas en
la fundo de la tajdo. Tio ne ebligas esti optimista.

Manko de idealo, egoismo, malsolidareco estas la nuna
sinteno. Eble necesas tuŝi la fundon por piedbatante ĝin
oni revigliĝu por antaŭeniri. Esperu ni!

Ĵanseb :

KIO FALIS ?

Sovetunio disfalis. Kio falis ekzakte? Ĉu imperio?
Ĉu komunismo? Ĉu marksismo? Ĉu la komunisto partio?
Ĉu la centralizismo?

Ĉu estas la triumfo de la kapitalismo? Mi pensas
ke ne, ĉar ĝi perdas sian ĉefan pravigilon, la ko-
munismon. Al la kontraŭuloj de la kapitalismo oni
ofte diris : "Se vi ne kontentas, iru orienten!"

Tiel oni pruvis, ke kapitalismo estas pli bona ol komunismo. Nun la sama argumento pruvas nur, ke riĉo estas pli bona ol malriĉo, kaj, pri tio, iu ajn konsentas.

Tamen, eĉ se la originala ideo pri komunismo estis altruisma, la apliko iĝis pli kaj pli malkongrua kun ĝi. Kaj de la malsukceso de la soveta sistemo oni povas tiri almenaŭ kelkajn konkludojn :

1. Ne ekzistas unu vero, lokebla en la kapo de unu homo. For la dogmismo!

2. Unu sola homo ne povas mastri ĉion, inkluzive siajn proksimumojn. Diktatoro neniam povas esti certa, ke oni ne komplotas kontraŭ li. For la diktaturo!

3. Ĉio ŝanĝiĝas. La mondo, la ideoj, la homgrupoj ŝanĝiĝas, inkluzive de la sociaj klasoj. Eĉ la plej ideala proletaro allogos la profitemulojn, ekde kiam ĝi havas la regpovon. Solvo, iam bona, povas iĝi aĉa en alia epoko. For la konservativismo!

Tion dirinte, mi komprenas, ke la ĵusaj eventoj estas malfacile akcepteblaj por homoj, kiuj luktis kun sincero por sia idealo. Sed la idealo ĉiam ekzistas, justaj socioj ĉiam estas konstruindaj. Nur la rimedo, t.e. la Partio, pruvigis maltaŭga. Tio rememorigas al ni, ke la partioj ne estas celoj en si mem.

Parenteze, la samo validas por esperanto : ĉu multaj el ni ne timas ke la fina venko estos ankaŭ la venka fino... de nia movado? Feliĉe, ĉiam estis homoj kiuj luktas por pli bona socio. Ili provas aliajn rimedojn : ekologion, neperforton, bonfarajn agadojn, influojn pere de la amaskomunikiloj, ktp... Eble tiuj agadoj estos pli sukcesaj, aŭ almenaŭ proksimigos la homaron al ideala socio.

Ĉar ni pluseknu la idealon : socioj pli justaj, pli ekologiaj, pli pacaj, pli altigaj por la homo..., kaj ne forgesu, ke ili devas esti ankaŭ dezirataj de ĉiuj, ne truditaj de iuj al la aliaj.

Feliĉan Novjaron!

Patrik Burevestnik :

Kiel ŝtormobirdo de Laŭte, kiu ĉiam malice anoncas ion alian ol la kutiman planitajn (Esperanton, Socialismon, Demokration ktp...), mi ne volas perdi la okazon prirespondi la naivajn demandojn metitajn en tiu angela debato. Ĉu mi kapablu kvietigi la angorojn kaj ne plikreskigi ilin?

- Kial pluvivas Kapitalismo?
- Kapitalismo ne estas religio nek ideologio (malkiel socialismo). Se oni disponus nur pri laboro, sen kapablo sub ia ajn formo, tiam oni vivus aŭ pli ĝuste revivus prahistoriajn tempojn... Kapitalismo samkiel la laborfortoj sed proporcie pli kaj pli vivtenas onin kaj reciproke...
- Kial la proletoj ne emancipiĝis?
- Ĉar tion ne permesis manpleno da etburgaj, oportunistaj, revoluciprofesiuloj nome : la babovistoj/jakcbenoj/bonapartistoj/marksistoj...
- Kial Komunismo fiaskis?
- Disfalas nur la kredo en ĝi, sed paradokse ĝi troviĝas en situacio favora por ĝia reala efektivigo.
- Ĉu Historio finiĝis?
- Tute ne. Ĝi akceliĝis kaj plue akceliĝos ĝis la elfinigo de l'jarcento.
- Ĉu ni aliras novan sociordon?
- Kion ni nomas "ordo", tio estas nur stabiligita malordo kaj tiu malordo pli kaj pli malstabiligos.
- Kion mi pensu pri sinceraj komunistoj?
- Jam ilin taksis Nostradamo antaŭ 440 jaroj : "idiotaj senkapuloj".
- Kial la Mondo ne perfektas?
- Tia ĝin faras la Homoj.
- Kial la Homo ne estas perfekta?
- Ja tia li estas, sed li ne volas kredi je tio.
- Ĉu ekzistas unu vero?
- Jes. Nepre estu unu vero pri ĉio ajn, kaj la vero pri racio estas ke ĝi neniel sendevigu pri fido, samkiel relativeco ne sendevigas pri absoluteco. Ankaŭ racio bezonas fidon.
- Ĉu ĉio ĉiam ŝanĝiĝas?
- Ne. Kio ŝanĝiĝas, tio estas ŝajno. Kio esencas, tio neniam ŝanĝiĝas.
- Kion povas unu sola homo?

- Ĉion, kio de li dependas, tion li pcvas, kaj tio estas pli ol necese.

- Ĉu oni klopodu helpi al plibonigo de la socio per politika agado?

- La plibonigo estas nur ŝajnc. Efikas la konscio nur pri tio perfekta kio kuŝas en ni. Politika agado estas uzurista grandanimo, nenidira parolo, sterila semo, nura propagando. Propagando estas plej aĉa afero en socio. Propagando fiaskigas Esperanton.

- Kion oni faru?

- Pliutile demandu : Kion oni ne plu faru?... Kaj respondu persone kaj ne propagande, intime kaj ne publike.

- Kio okazos al Eŭropo kaj eks-Sovetio dum tiu ĉi jaro kaj proksimaj?

- Sovetio enprofundiĝos en ĥaoso planata de profitemaj politikistoj, kiu finruiniĝos la iluzion pri iu Eŭropa unuigo kaj tio kongruos al amiko Usono. Kreskos kontraŭ-eŭropaj kaj kontraŭ-fremdaj sentoj kaj partioj. Arabislanda revolucio grave perturbos francan politikon kaj provokos ŝanĝojn kaj krizon.

- Kial mi asentus sen argumenti?

- Mi diras tion, kion mi sentas, laŭ miaj vivintaĵoj. Argumentoj nur iĝus kontraŭ-argumentoj en alia buŝo kaj pravigoj por kiu volas opinii malsame.

(daŭrigo en L!98)

17-a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO

Pro niaj pasintjaraj sukcesoj, ni organizos dum la venonta somero internacian semajnon kiu okazos ĉe mediteranea marbordo, en havenurbo Sète, 30 km okcidente de Montpellier, en bela parko apud la maro, de la 12-a ĝis la 19-a de septembro 1992.

Ni proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esp-o.

Ni havos trinivelajn kursojn gvidatajn de eminentaj geinstruistoj inter kiuj Pierre Babin. Kiel ĉiujare vi trovos vere internacian etoson. Ankaŭ... banado, ekskursoj, interesaj vesperkunveno- kaj bona manĝo ĝojigos vin.

Tre modesta restadokosto ; la restadejo taŭgas por rulseĝuloj ; ebleco tendumi proksime ; aliĝo kaj informoj :

Centre Culturel Esperanto de Montpellier, 5 rue du Docteur Roux, F-34000 MONTPELLIER (Francio) Tel : 33 67 54 15 43



Olivrikolto en Provenco

K-do GENTE anoncis al mi, ke morgaŭ li rikoltos olivojn. Tio memorigas min pri la kvar versoj, kiujn Frederiko MISTRAL metis ĉekape de sia lasta poemkolekto "Lis Olivado" (La Olivrikolto) :

Vetera malvarmiĝo kaj maro salivanta,
Ĉio diras, ke vintro estas por mi veninta
Kaj ke endas rikolti urĝe miajn olivojn
Kaj oferi l'oleon virgan al Di-altaro.

Ĉian proporcion gardante, mi povus samon diri pri mi, ĉar efektive venis por mi la vintro. Mi do provas urĝe kolekti niajn olivojn : "Novajn Vortojn de Maljunulo" !

Mi ja malmodeste supozas, ke kelkaj legantoj sufiĉe ŝatas ilin.

Generalo, proletoj kaj socialismo (sekvo)

En L! 96 mi parolis pri generalo AOUN. Li nun fartas bone. Dankon. En sia luksa vilao li akceptas ĵurnalistojn kaj donas al ili intervjuojn, en kiuj li atakas kaj minacas la nunan registaron de sia lando (kies reprezentantoj estas oficiale akceptataj de nia Prezidento en Parizo).

Sed sufiĉe pri la generalo, mi ĝojas komuniki al vi grandan novaĵon pri la senhejmuloj. Ili freŝdate ricevis... novajn promesojn. Lia Prefekta Moŝto anoncis, ke ili baldaŭ ricevos provizorajn loĝejojn kaj post 3 jaroj konvenajn apartamentojn.

Kion plian ili povus postuli, deziri aŭ esperi? Ili ja ne estas generaloj, ĉu? Do, ili kontentiĝu per tiuj belaj promesoj kaj pacience atendu.

Pacienco estas ĉefa virto de proletoj.

Racio kaj tradicio

En la antikvaj lingvoj oni diris "ci" al ĉiu unuopa persono kaj "vi" al pluraj. Tio estis racia. Sed tiuj lingvoj estas mortaj.

La vivaj idiomoj de ili devenantaj (latinidaj, ĝermanidaj, k.c.) en sia natura evoluado adoptis formojn de ĝentileco. Plej radikale la angla rezervis la pronomon "ci" al Dio sola, kaj diras "vi" al ĉiu alia. Zamenhof, tion imitante, skribis en la Fundamento "Anstataŭ "ci" oni diras ordinare "vi".

En tio la majstro kiel ĉiam estis prudenta kaj prava. Li tiel evitis ŝoki la anglosaksojn kaj konformigis sian lingvon internacian al la kutimo de la eŭropaj nacilingvoj. Kutimo estas dua naturo, kaj tradicio estas pli forta ol racio.

Zamenhof mem donis la ekzemplon, neniam uzante la pronomon "ci", eĉ ne en la Biblio.

De tiam la vivaj lingvoj plu evoluis ne ĉiam en sama direkto.

Antaŭ pluraj generacioj franca infano diris "vi" al sia patro, "vi" al sia patrino. En la filmo "La Granda Iluzio" nobela oficiro rifuzante ciumi kun popola kolego deklaras: "Mi diras **vi** al mia patrino kaj mi diras **vi** al mia edzino." Sed tio estas escepto. Nun en la rilatoj inter parencoj, amikoj, kamaradoj, tre ĝeneraliĝis la uzado de "ci". Nun almenaŭ en Francio la gejunuloj spontane ciumas inter si ekde la unua renkonto. Tio estas racia kaj laŭ mi simpatia. Kial ni ne imitus tiun ĉi novan modon?

Mi ne proponus, ke ni revenu al la racio de la anktivaj lingvoj. Ni estas heredantoj de pura tradicio kaj ni disponas je du pronomoj: la "ci" de intimo kaj familiareco, la "vi" de respekto kaj ĝentileco. Ni laŭ la cirkonstanco elektu ĉu la unuan, ĉu la duan. Eble iuj protestos, ke mi volas enkonduki escepton en la gramatikon. Mi respondas: Ne, absolute ne! "Oni uzas ordinare **vi**", tio ne aspektas nek sonas kiel gramatika regulo. Ĝi estas nur konstato pri siatempa kutimo. Kaj ni vidis, ke kutimoj varias en la tempo.

KALOCSAY (en "Lingvo Stilo Formo") skribis, ke Z. kreinte la pronomon "ci" tuj mortigis ĝin. Malgraŭ la aŭtoritato de nia granda poeto mi ne konsentas pri tiu lia aserto. Z., kvankam li mem neniam uzis la pronomon "ci", tamen ne mortigis ĝin, ĉar li lasis ĝin en la Fundamento. Do ĝia

uzado estas kaj restas lica, do ni povas libere uzi ĝin.

Konklude:

1) Mi neniam dirus "ci" al anglalingva samideano, krom se li mem iniciatus tion (nuntempe malprobable hipotezo)
2) Kun ĉiu konsenta mi estas preta ciumi precipe en la medioj de SAT kaj de "Laŭte!". Mi diras "ci" al Rolando Grandière, al Kribo, al Jacqueline kaj reciproke malgraŭ la aĝa diferenco. Kiu ajn vi estas, diru "ci" al mi, mi akceptos kaj reciprokos. Tial ni celkonscie kontribuos al natura evoluo, kiu igos nian stilon pli riĉa kaj pli fleksebla, en la kadro de la Fundamento.

Notoj. 1. En 1936 en festo de la junulargastejoj la karmemora tre simpatic Margareta ASPES tute nature diris "ci" al mi. Tio iom ŝokis mian edzinon sed mi klarigis al ŝi, ke tio estas kutima en la medio de la junulgastejanoj.
2. En 1979, veturante sola inter Tuluzo kaj Avinjono, mi kunprenis dudekjaran portugalan petveturanton, kiu flue parolis france kaj kelkajn kilometrojn poste, samaĝan francan fraŭlinon. Ambaŭ gejunuloj neniam antaŭe interrenkontinte, tuj senĝene diris "ci" unu al la alia. Mi trovis tion tre simpatic.
3. En miaj aŭtobiografiaj verketoj kaj en miaj tradukoj mi ofte uzis la pronomon "ci". La Literatura Komitato konsentis al mi la kontrolvinjeton kvankam ĝi ne aprobis tiun uzadon. Mi persistis sub mia propra respondeco kun fortiga aprobo de Lanti. Neniu, eĉ anglalingva, leganto protestis.

Kial mi estas esperantisto

"En Esperantismo estas ia mistiko, ia religia kredo". Tion oni aŭdas en laikaj medioj, iafoje eĉ en la esperantista. Efektive, la kara lingvo, la sankta afero, la bela songo de l' homaro, la interna ideo, la verda standardo, ĉio ĉi aspektas religie, kaj estas ja religio en la etimologia senco: kio kunligas homojn. Oni nomas nin idealistoj, revuloj. Ni ne ruĝiĝu: nia idealo estas nobla, kaj nia revo estas bela.

Sed ne nur el tio konsistas esperantismo. Mi ne kredas pri esperanto. Mi opinias, ke:

1) Lingvo internacia estas necesa. Aserto facile pravigebla.

2) La taŭga solvo estas la lingvo de D-ro Esperanto kaj de la Fundamento.

Tiu ĉi opinio ne estas bazita sur teoria rezonado, sed sur praktika sperto.

Ĝis printempo 1914 mi sciis, ke ekzistas unu lingvo internacia. Tiam mi unuafoje aŭdis pri Ido kaj aliaj planlingvaj projektoj. Mi ekdubis: Ĉu esperanto estas vere la plej bona solvo? Mi daŭrigis mian perfektigajn ekzercojn, sed la dubo min turmentadis. En 1919 mi faris lojalan propon: mi lernis Idon. Iom supraĵe, mi konfesas, sed sufiĉe por kompari. Laŭ mi, la komparo ne estis favora al la Ido de Bofronto.

En 1921, kiam mi renkontis la simpatian kamaradon Papillon, fervoran propagandiston de Ido, kaj interparolis kun li parte en Ido, parte en Esperanto, mi jam sciis, ke mi ne fariĝos idisto.

En la sama epoko Eŭgeno ADAM (Lanti), kiun mi ne konis, faris saman sperton, kaj konkludis per sama decido.

Poste mi legis sufiĉe multajn tekstojn en ido, en occidental kaj en aliaj planlingvoj. Tiuj legaĵoj, facilaj por franclingvano, konfirmis mian opinion, kaj firmigis mian decidon.

Tre longe poste mi eksciis pri la pretendata "moderna esperanto". Tion mi trovis la plej kretena fuŝaĵo iam elĝerminta el tordita cerbo.

Tial mi restas fidela al la Fundamento. Parte pro sento, tion mi ne neas, sed ankaŭ kaj precipe pro malvarma racia konvinko.

Cetere, esperanto ne estas ia plibonigenda projekto. Ĝi ekzistas kaj funkcias jam pli ol cent jarojn. Ĝi havas gazetojn, revuojn, radio-elsendojn, jam riĉan literaturon. Ĝi estas praktikata skribe kaj parolĉe de multopa popolo dise tra la mondo. Unuvorte ĝi estas lingvo vivanta, prenda kaj uzenda tia, kia ĝi estas.

Tial kaj precipe tial mi estas esperantisto.

VALO



SUBTILAĴOJ DE NASRUDINO

(Fragmentoj el: "LA SUBTILAĴOJ DE L' NEKOMPAREBLA NASRUDINO", de la hinda erudiciulo Idrieso ŜAĤO)

La majstro (de spirita saĝeco) Hoĵo NASRUDINO (aŭ: NASREDINO) naskiĝis en Turkio, en 1350^a kaj forpasis en 1399^a (?). Li estis samtempulo de Tamerlano.

Supraĵe, la plej grandan parton el la anekdotoj de Hoĵo NASRUDINO oni rajtas konsideri kiel spritajn ŝercojn, tre diskonigatajn en aziaj landoj, sed ĝenerale, ili kaŝas pli profundajn signifojn, kiuj ebligas disvolvi specialajn statojn de konscio, de mistika ordo, ĉar la sufiismo aŭ sufia inicado por la spirita disvolviĝo estas io kion oni travivas kaj perceptas.

La spritaĵoj Nasrudinaj ne povas estigi per si mem la kompletan iluminon, sed ili starigas ponton inter la monda vivo kaj la transmutacio de l'konscienco, en maniero tia ke neniu alia formo beletra sukcesis atingi.

Ilia celo estas proksimigi nin al la realigo de l' mistika sperto. La ĉi-sekva anekdoto ilustras ke la sufiismo estas praktika aktiveco, kaj ĝi demontras ke la formala intelekto ne povas atingi la veron, ke la penso bazata sur modeloj derivataj de l' familiara mondo ne povas esti aplikata al la vera realo, kiu troviĝas en alia dimensio.

NASRUDINO kondukis filozofon en sia boato, tra rivero kies surfaco ekondumis ĉar proksimiĝis tempesto. La akademiisto demandis: ĉu vi studis filozofion?

— Ne! — Do, vi perdis la duonon de via vivo!

Kelkajn minutojn poste, NASRUDINO turniĝis al sia pasaĝero kaj pridemandis lin, dum impete pliintensiĝis la riverondo: ĉu vi scipovas naĝi?

— Ne. ĉKial?

— Ĉar tiukaze vi perdos vian TUTAN vivon! La boato sinkas pro la tempesto! (Kaj dirinte ĉi tion, NASRUDINO ĵetis sin en la akvon, kaj fornaĝis, dum la filozofo dronis, sen ke lia filozofio estus povinta savi lin!)

Hoĵo NASRUDINO, en sia funkcio de majstro de sufia saĝeco, ofte uzas la derviŝan teĥnikon ludi la rolon de homo neiluminita, en la anekdotoj, kun la celo klarigi veron. En la ĉi-sekva ekzemplo, li neas la supraĵan kredon pri kaŭzo kaj efiko:

Iun tagon, NASRUDINO promenis laŭlonge de strateto,

kiam subite de sur teraso, viro falis sur lin. La viro restis sendifekta, sed NASRUDINO oni kondukis en hospitalon.

—Ĉiun instruon oni deduktas el ĉi tiu okazaĵo, majstro? —pridemandis lin disĉiplo.

—Evidu kredi je neeviteblaĵo, kvankam kaŭzo kaj efiko ŝajnas neeviteblaj! Forkuru de teoriaj demandoj ĉi-specaj: Se viro falas de sur teraso, ĉu li rompos al si la kapon? Li falis, sed estas MIA kapo, tiu, kiun li rompis!

Ĉar ordinara homo pensas laŭ ordinaraj modeloj kaj ne povas aĝustigi al malsamaj vidpunktoj, li perdas grandan parton el la vivosignifo; li povas vivi, li povas progresi, sed li ne povas kompreni ĉion okazantan.

La rakonteto pri la kontrabandisto klarigas ĉi tion tre bone:

NASRUDINO kutimis trairi la landlimon ĉiutage kun sia azeno ŝargita de pajlo. Ĉar li akceptis esti kontrabandisto, ĉiuvespere, ĉe reveno hejmen, la gardistoj zorge traserĉis lin. Ili traserĉis lian personon, kontrolesploris la pajlon, metis ĝin en akvon, foje eĉ forbruligis ĝin. Intertempe evidentiĝis ke la majstro NASRUDINO fariĝadis pli kaj pli riĉa.

Iom da tempo poste li retiriĝis de la kontrabandado kaj iris loĝi en alia lando. Jarojn poste unu el la oficioj renkontis lin, kaj diris:

—Nun, vi ja povas diri, NASRUDINO, ĉi kion vi kontrabandis ke ni neniam povis malkovri ĝin?

—Azenojn! —respondis NASRUDINO.

Ĉi tiu rakonteto emfazas ankaŭ unu el la plej grandaj argumentoj de la sufiismo: ke la supernatura sperto kaj la mistika celo estas io pli proksima al la homaro ol oni supozas. Pro nescio iuj homoj supozas ke io esotera aŭ transcenda devas esti tre fora aŭ tre komplika. Kaj tiaj individuoj estas la malplej kapablaj juĝi la aferon. Ĝi estas "tre fora" nur en direkto, kiu ili ne komprenas.

La homoj ne scias kien iri kiam ili serĉas iluminon. Kiel rezulto, ni ne miru, se ili aliĝas al kiu ajn kulto, al ĉiuspecaj teorioj, kredante ke ili kapablas distingi tion veran disde tio falsa. Hoĵo NASRUDINO plurforme instruis ĉi tion. Jen unu el liaj plej famaj spritaĵoj:

—Foje, najbaro vidis ke NASRUDINO surgenue serĉadas ion.

—Ĉi kion vi perdis, majstro?

—La ŝlosilon! —respondis NASRUDINO.

—Post kelkminuta serĉado, la najbaro pludemandis:

—Ĉi kie vi perdis ĝin?

—Hejme.

—Do, ĉi kial vi serĉas ĝin ĉi tie?

—Ĉar ĉi tie estas pli da lumo!

La alegorio pri la pomo prezentas aliajn fundamentajn elementojn: NASRUDINO sidis antaŭ grupo de disĉiploj, kiam unu el ili pridemandis la rilaton inter aferoj de ĉi tiu mondo kaj aferoj de malsama dimensio. La majstro respondis: —Vi devas kompreni la alegorion.

La disĉiplo petis: —Montru ion praktikan, ekzemple, pomon el la Paradizo.

NASRUDINO prenis pomon kaj enmanigis ĝin al la disĉiplo, kiu komentis: —Sed, ĉi tiu pomo estas putrinta; Paradiza pomo certe estus perfekta!

Paradiza pomo certe estus perfekta —ripetis NASRUDINO kaj aldonis—, sed ĝis kie vi povas juĝi ĝin, situante, kiel ni estas, en ĉi tiu loĝejo de korupteco, kaj kun viaj nuntempaj fakultoj, vi neniam povos koncepti ion, kio similos pli al Paradiza pomo.

La disĉiplo komprenis ke la vortoj, kiujn ni uzas por aferoj metafizikaj, havas sian bazon sur vortoj fizikaj. Por povi penetri en alian dimension de kono, ni devas aĝustigi al la formo de kompreno de tiu dimensio.

La radio de intuicia ilumino kiu estiĝas kiel rezulto de ĉi spritaĵoj estas en si mem malgranda ilumino, ne intelekta sperto; ĝi estas ankaŭ ŝtupo al la restarigo de la mistika perceptado en menso enkarcerigita, kruele kondiĉita de sistemoj de trejnado de l' materia vivo.

La sufia instruo povas esti plenumita nur de inicito, ne fare de teoriulo aŭ de intelektulo. Ĉar la sufiismo estas harmoniigo kun la vera realo, ĝi ne povas simili ekzakte al tio, kion ni perceptas kiel realon, kiu estas, fakte, primitiva ensemblo de supozoj je mallonga templimo. Ekzemple, ni emas analizi la faktojn el nur unu vidpunkto. Ni ankaŭ supozas, sen ia pravigo, ke fakto okazas ekster kunteksto. Tamen ĉiu fakto estas asociata kun la ceteraj faktoj. Nur, kiam ni estaj pretaj sperti nian interrilaton kun la organismo, kiu la vivo

estas, ni povas apreci la mistikan sperton. Se ni observos kiun ajn agon plenumitan de ni aŭ de kiu ajn alia persono, ni konstatos ke ĝi estis impulsata de unu el la multaj eblaj stimuloj, kaj ke neniam temas pri izolata ago; ĝi havas konsekvencojn, el kiuj multaj ne estis espereblaj, kaj kiujn oni ne estus povinta certe antaŭvidi.

Alia spritaĵo de Hoĵo NASRUDINO reliefigas ĉi tiun esencan cirklecon de la realo, kaj la ĝenerale nevideblajn interagojn, kiuj okazas en ĝi:

Iun tagon NASRUDINO piediris laŭlonge de soleca vojo. Vesperigis kiam li ekvidis grupon de rajdantoj kiuj proksimiĝis. Lia imago eklaboris, kaj li ektimis ke ili povus prirabi lin, aŭ devigi lin rekrutiĝi en la armeo. Li tiom ektimis ke li supersaltis barilon kaj troviĝis en tombejo. La rajdantoj, kiuj havis neniun el la motivoj kiujn NASRUDINO estis supozinta, eksentis scivolemon kaj sekvis lin. Kiam ili proksimiĝis al li, kaj vidis lin kuŝanta, tute senmova, unu diris:

—Ĉu ni povas helpi vin?, ĉi kial vi estas ĉi tie en tia pozicio?

NASRUDINO, komprenante sian maltrafon, diris:

Tio estas pli komplika ol vi supozas. Vidu, MI estas ĉi tie kaŭze de VI; kaj VI estas ĉi tie kaŭze de MI.

Nur la mistika homo, kiu "revenas" al la formala mondo, post la reala sperto de la interdependeco de aferoj ŝajne malsamaj aŭ sen konekto, povas fakte percepti la vivon en ĉi tiu formo. Por la esotera inicito ajna metodo metafizika, kiu ne inkludas ĉi tiun faktoron, estas metodo artefarita (ekstera), kaj ne povas esti la produkto de tio kion li nomas mistika sperto. Lia ekzistado mem estas malhelpo por atingi la starigitan celon. Ĉi tio ne signifas ke la inicito, kiel rezulto de siaj spertoj, apartiĝas de la realo de supraĵa vivo. Li havas aldonan dimension de esto, kiu agas paralele de la malgranda kono de ordinara homo. Hoĵo NASRUDINO brile resumas ĉi tion en alia spritaĵo:

—Mi povas vidi en la mallumo.

—Tio povas esti vero, majstro, sed se estas tiel, ĉi kial vi foje vi portas kandelon, kiam estas nokte?

—Por eviti ke aliaj personoj koliziu min!

—La lumo, kiun la esotera inicito portas, povas esti alia adaptiĝo al la kutimoj de l'medio en kiu li trovi-

ĝas, je l' "reveno" el sia transmutacio interne de pli ampleksa perceptado.

La inicito estas, dank' al sia transmutacio, konscia parto de la vivanta realo de ĉiu estulo. Ĉi tio signifas ke li ne povas konsideri tion, kio okazas al li aŭ al aliaj, en la formo limigita en kiu tion faras la teologo aŭ la filozofo.

Oni asertas ke la mistika efiko de sep spritaĵoj de Hoĵo NASRUDINO, sinsekve studitaj, sufiĉas por pretigi homon por la ilumino.

Ke la konon oni ne povas atingi sen fortostreĉo estas fakto ĝenerale akceptata. Sed la ridindaj metodoj uzataj por projekcii la fortostreĉon, kaj la absurdecon de l' fortostreĉoj mem, malhelpas al la individuoj, kiuj klopodas transigi la instru-sistemojn de unu kampo al alia, atingi la celon de l'kono.

La jogurton oni atingas per aldono de eta kvanto da jogurto al iu kvanto da lakto.

Iun tagon, iuj amikoj vidis NASRUDINO-n apud cisterno. Li verŝis iom da jogurto en la akvon. Unu el la amikoj demandis: —ĉi kion vi provas fari, NASRUDINO?

—Mi provas fari jogurton.

—Sed ne eblas fari jogurton tiamaniere.

—Jes, mi scias; sed mi provas malgraŭ tio.

Kiu ajn ridetos antaŭ ĉi tiu idiotaĵo de la "sencia" majstro. Miloj da homoj, kiuj ne provos fari jogurton per akvo, provos tamen penetri la esoteran pensadon per metodoj egale senutilaj.

Laŭmezure pliintensiĝas la propraj perceptoj, pliintensiĝas la povo eltiri nutraĵon el la Nasrudinaj anekdotoj. Ili provizas al la komencanto iun "frapon", "skuon" aŭ ŝokon, kiu agas en speciala formo, pretigante la menson por la psikologia laboro pri si mem.

En iu senco, ili plenumas la funkcion de reala frapo kiel okazas en unu el la koncizaj spritaĵoj de l'majstro:

NASRUDINO donis amforon al knabo kaj diris ke li alportu akvon el la fontano, samtempe frapante lian kapon. —Estu atenta, zorgu ke la amforo ne rompiĝu.

Rigardanto komentis: —ĉi kial vi frapas iun, kiu faris nenion malbonan?

—Supozeble —respondis NASRUDINO—, vi pliŝatus ke mi frapu lin POST kiam li estos rompinta la amforon, kiam estos perdiĝintaj la amforo kaj la akvo. Agante kiel mi

agis, la knabo memoros, kaj tiel konserviĝos la amforo kaj ĝia enhavo.

Ĉar la inicado estas laboro komprendisvolva, la serĉanto, simile al la knabo, devas lerni. La psikologia laboro havas siajn proprajn regulojn, kiuj malsamas de la mondaj metodoj de artoj kaj sciencoj.

Neniu povas trairi la vojon de inicado sen havi potencialon por tio, ĉar la eblecoj de eraro estas tro grandaj por ke tiu havu okazon reveni kun la akvo sen rompi la amforon.

Kaj por fini, jen aforismo de Hoĵo NASRUDINO:

La homoj vendas je altegaj prezoj papagojn kiuj parolas. Ili neniam haltas pripensi la eblan valoron de papago kiu PENSAS!

Resumtraduke kompilis: ERGOTO DE BONAERO



Bildo el Agénio : la turo de Hautefage,
je 15 km. de Beauville

SE MI EKZISTUS, MI JAM DELONGE DETRUUS LA LIBRON

La mondo estas vasta, tiom vastega, ke multas la homoj, kiuj ĝin loĝas. Ĉiutage, la homoj iras, serĉante por si vojon, la vojon, kiu konduku ilin al liberejo. Ĉiu homo havas en si fiksitan celon, kiun li klopodas atingi. Tio estas la vivcelo, kiu varias de unu homo al la alia. Por alproksimigi sin al tiu celo, la homoj kompreneble uzas diversajn rimedojn. Ni ne miru, sciigante, ke tiajn rimedojn plejparte malkaŝas la sanktaj libroj, inter kiuj plej uzataj estas la Biblio.

La biblio estas la kolekto de la paroloj, kiujn Dio adresis al la homoj pere de superhomoj, homoj inspiritaj. Dio, kiu kreis la mondon, volis per la biblio montri al la homoj, ke ĉiuj havas unusolan vivcelon, kaj tiu estas atingebla nur per la instruoj de la biblio. Tiu celo estas **renaskiĝi en dia hejmo**, kio estas ebla dank'al la sankta libro. Jen ĉi-supre la vorto, kiun mi ĉiutage aŭdas el la buŝoj de heredontoj de la dia regno. Ĉu ankaŭ mia vivcelo estas tiu, kiun la biblio rekomendas?

Mi ne scias, ĉu mi observas diajn parolojn, nek konas ian hejmon dian, kie mi povos iam renaskiĝi. Vivante kun dikredantoj, tiuj kiuj ege sopiras tiun hejmon dian, mi konvinkiĝis, ke mi neniel bezonas ian renaskiĝon en iu hejmo, kiu ekzistas nur en penso de homoj. Mi daŭre estas tiel konvinkita, ĉar en mi io ĉiam sonas: "Se mi ekzistus, mi jam delonge detruus la libron." Surbaze de tiu sonado, mi ĉiam enmemiĝas, revuante agojn de kunuloj dikredantaj:

* Vivas edzoparo en nia domo. Ili estas anoj de la sekto "Diaj asembleoj". Ĉiun agon, kiun ili faras, ili pravigas per la biblio. Tiel, la geknabojn, kiuj servas ilin, ili kru-
ele traktas. Tiuj geknaboj restas senmanĝe, sed laboras tutan tagon, dum la mastroj mem ĉiuhore maĉas. Por bagatela afero la bubojn ili sange batas.

* Alia edzoparo en apuda domo estas samreligia. Vivis kun ili du fraŭlinoj, kiuj obeeme servis ilin dum krizo, la senlabora periodo de la edzo. Feliĉe, la viro trovis laboron: la edzino forpelis la fraŭlinojn, dirante, ke ŝi

neniel volas, ke ili profitu kune kun ŝi la lukron de la edzo. Ĉu vi scias, ke la edzo tute aprobis la konduton de la edzino?

Kaj tiu edzoparo ĉiam invitas min al sia kredogrupo. Kiam mi iam demandis ilin pri la foriro de la fraŭlinoj, ili tiam respondis min per "eĉ David la psalmisto ĉiam pekadis en la biblio. Ĉiufoje, kiam ni pekas, ni konfesas, kaj Dio pardonas. La biblio instruas, ke ni devas rekoni niajn pekojn kaj ilin konfesi."

* Virino en nia domo kolektas la lupagojn de la luantoj. Ŝi estas katoliko. Ŝi ĵus baptiĝis kaj la tagon, kiam ŝi unuafoje komuniĝis, ŝi kalumniis, insultis kaj forpelis sandomanojn. Poste mi aŭdis ŝin klaĉanta: "Mi tre ĝojas esti katoliko, ĉar dank'al la pastro, al kiu mi konfesis ĉiujn miajn pekojn, ĉio nun estas al mi pardonita. Tuj post kiam mi malbone agos, mi konfesos al la pastro, kaj mi estos tuj senpeka. Mi ĝojegas, ke mi mortos senpeka. Mi povos kelkafoje fari donacojn al la pastro."

Jen tiom da agoj, kiujn homoj faras, elvokante la biblion, do la Dion. Se Dio vere ekzistas, ĉu li ne povas montri, ke ne tio estas la celo de la Biblio? Dio silentas. Ne venis, ne venas, neniam venos reago de Dio. Ĉu li tamen ekzistas por permesi, ke homoj uzu la biblion por atenci kontraŭ la biblio? Ho! Io estas sonanta en mi: "Se mi ekzistus, mi jam delonge detruus la biblion".

Delfeno TIETTI

"Esti malriĉa kaj eniri Ĉielon povas sukcesi iu ajn. La riĉuloj elektis pli malfacilan vojon. Tion Dio povos nur enkalkuli al ili."

"Tuj predikas moralon, esperante de tio profiti se aliuloj sin lasas kapti."

"Se li estus sciinta, ke la mondo tiom longe daŭros kaj ke ni estos tiom multenombraj, la unua, kiu diris, ke fi-ne estos ĝenerala revivado, certe estus trovinta ion alian."

"Dio: iu, al kiu ni povas longe paroli pri niaj aferoj, ne riskante ke li interrompu nin por paroli al ni pri la propraj."

El "Pensoj" de ANARIN (Ja ne "AZORIN", kiel



KUIRRECEPTO

Aleksandro DUMAS (1802-1870), la fama verkisto de "La tri musketistoj" kaj de "La grafo de Monto Kristo", estis sufiĉe verkabunda. Li produktis pli ol 300 romanojn. Ĉu sola? Jen la demando.

Malpli konata estas la fakto ke li verkis "La plenan vortaron pri la kuirarto". Ne temas pri receptlibro, sed ja pri sprita kompilaĵo de re-

ceptoj, anekdotoj, konsideroj pri la produktoj, ktp, ĉio markita per la talento de la verkisto, granda amato de bonaj vinoj kaj delikata manĝo.

Sciinde estas ke la korektisto de la presprovaĵoj por la unua eldono de tiu vortaro estis la estonta giganto de la franca literaturo: Anatole France.

Minimume dirite, kelkaj strangaj receptoj mirigas la leganton. Inter aliaj, unu pri la elefantpiedoĵ! Ne kutima manĝaĵo!

Mi estas kuiristo. Tial mi proponas al vi version de tiu recepto. Freŝbakitaj kuiristoj sin detenu!

Aĉetu kvar elefantpiedoĵn (mi ja scias ke oni ilin malfacile trovas, sed intense preĝu, ili eble falos el la ĉielo). Zorge lavu ilin, precipe la ungojn.

Aliflanke, vi senĉeligu 10 kilogramojn da cepoj. Verŝajne vi ekploros, miaj geamikoj, kaj mi ne povas sufiĉe rekomendi al vi surmeti okulvitrojn. Poste, tranĉu tiujn cepojn en malgrandajn pecojn kiujn vi brunigu kun gras-aĵo en tiom granda kuirpoto ke ĝi povu enhavi la kvar piedojn.

Verŝajne vi ne posedas tian kuirpoton, kvankam tiu ĉi devus havi sian lokon en ĉiu kuirejo. Ne gravas. Jen la solvo! Telefonu al via plumbisto por ke li transloku vian banujon en la ĝardenon. Vi ja scias ke plumbisto kiu rapide respondas al via alvoko estas tiom malofta

kiom rideto sur la vizaĝo de funebrietoj. Do, kontaktu lin kelkajn semajnojn antaŭ la tago kiu faros el vi la faman kuirist(in)on, kiu, dum jaroj, estos la temo de la klaĉoj en via loĝloko kaj kiu famigos vian urbon. Komprenoble, ne uzu vian kutiman gasfornon, sed ekbruligu grandan lignofajron sub la banujo. Antaŭvidu sufiĉe da ligno.

Kiam la cepoj estas brunaj, vi aldonu ajlon, laŭron, timianon, salon kaj pipron. Metu la piedojn en la banujon kaj vi alverŝu sufiĉe da ruĝa vino por kovri la kvar delikataĵojn. Mi kutime bezonas cent litrojn. Lasu kuiri dum du tagoj. La piedoj estos kuiritaj kiam la haŭto estos fariĝinta mola.

Ĉu vi antaŭvidis sufiĉe da ligno? Ne! Bruligu viajn meblojn, vian televidon, aŭtomobilon, skribmaŝinon, vian bopatrinojn, la Plenan Analizan Gramatikon, la impostkontroliston, la tamburon de via filo ktp. Uzu la okazon por senigi vin je ĉio kio malhelpas feliĉan vivon. Vi trafos du celojn per unu ŝtono.

Post kiam la piedoj estas kuiritaj, ripozu kelkajn horojn. Ĝuste antaŭ la alveno de viaj gastoj, aldonu tri kilogramojn da bonkvalita mustardo, densigu helpe de amel-faruno kaj spicu laŭguste. Servu kun frititaj terpomoj kaj pomkaĉo. Bonan apetiton!

Verŝajne viaj gastoj ne sukcesos elĉerpi la manĝaĵon.

La sekvontan tagon, invitu la eminentulojn el via urbo t.e. la policiston, la leterportiston, la pastron, la buĉiston, la fanfarestron kaj, mi preskaŭ forgesis lin, la urbestron. Ne neglektu la plumbiston. Li certe venos pli rapide ol la unuan fojon, se vi al li sciigos ke li havos la unikan ŝancon frandi elefantpiedojn. Estu ruza kaj devigu lin reloki la banujon antaŭ ol partopreni en la festeno.

Oftege mi prenis tiun pladon je granda ĝojo de miaj miriĝitaj gastoj.

Ek al la laboro! Honorloko atendas vin en la paradiza kuirejo.

H. CASTIAU


JEN LA DUA

KASEDO

DE

PERSONE

"EN LA
SPEGULO"



Kun naŭ tute freŝe registritaj kantaĵoj de la fama rokbando konata de IJK-oj, UK-oj, IS-oj KTP-oj.

Ĉiuj kantaĵoj estas originale verkita en Esperanto de la grupo mem. Ĝuu ekzemple:

Kio ajn - Amanda - Alia mondo - Neĝo dancas kaj aliajn furoraĵojn.

KIEL MENDI?

Se vi volas minime dek ekzemplerojn mendu rekte de PERSONE.

Tiel vi profitas la plej bonan prezon.

10 ekz. = 155 Nederlandaj Guldenoj (= po 15,5 NLG)

+ afranko: 12 NLG en Eŭropo (15 NLG ekster Eŭropo)

SUME: 167 NLG por 10 ekz. en Eŭropo (170 NLG por 10 ekz. ekster Eŭropo)

Pagu al UEA-konto: *weng-d* (Se vi ne scias, kiel pagi al UEA, kontaktu vian Esperanto-klubon, aŭ legu en la Jarlibro de UEA.)

Mendu ĉe PERSONE, c/o Wennergren

Västertorpsv. 154, S-126 59 Hågersten, SVEDIO

Por mendi malpli ol 10 ekzemplerojn, turnu vin al EUROKKA (ROK-GAZET)

F-31450 Donneville
FRANCIO

Ĉe EUROKKA eblas mendi ankaŭ nian unuan kasedon 62 MINUTOJ.

accorder ses faveurs à quelqu'un : amfavori al iu
 air fin (avoir l'), avoir bonne mine - ironie - : ridindiĝi
 aller au charbon :
 1) aller à l'abattage / aller au front de taille : iri al la atakfronto
 2) fig. - en politique : kampanji
 amour d'enfant (un) : anĝeleta, kerubeto
 amour sans partage (un) : nedividita amo
 amuser comme des petits fous (s') : amuziĝi kvazaŭ petoluloj
 apôtre de (se faire l') : prikanti, laŭdi
 appeler un chat un chat : nomi ĉion per la ĝusta nomo
 apprendre par cœur : ellerni, perkere lerni
 appuyer sur le champignon : mallevi la akcelilon
 argent facile (avoir l') : esti elspezema voir : 82
 arme blanche (à l') : per nuda glavo
 armé de patience : armita je pacienco Z
 armer de patience (s') : provizi sian animon per pacienco
 arriver à destination : alveni en sia loko de destino Z
 article (faire l') : varlaŭdi, reklami
 attendu que ... : konsidere, ke ...
 attirer les foudres de qn (s') : altiri al si ies koleron, iun kolorigi kontraŭ si
 autres chats à fouetter (avoir d') : havi pli gravajn taskojn por prizorgi
 avancer à pas de géants : progresadi per gigantaj paŝoj
 aveuglette (à l'), à tâtons : blinde voir : 3275
 bailleur de fonds (un) : monpruntisto
 bas monde (en ce), ici bas : en ĉi tiu mondo
 bas peuple (le) : la vulgularo
 battre la chamade : fuŝbati
 battre la charge : tamburi por la atako
 baver (en) : sange ŝviti
 baver (en faire) : malmilde trakti
 baver des ronds de chapeaux : gapi pro miro
 beau (avoir) : vane ... i
 beau faire (avoir) : kiom ajn trovi
 - Kiom ajn mi provis forigi ĉe ili tiun kredon, mi ne sukcesis Z
 bête noire (la) : la nigra ŝafo voir : 278
 boire en suisse : kaŝe trinki
 bon jour (être dans un) : esti en favora tago
 bon matin (de) : frumatene
 bonne fourchette (une) : manĝemulo voir : 242
 bonne franquette (à la) : senceremonie
 bonne mine (avoir) : voir : air fin

kaj LIBERECO

3. EKONOMIAJ SOLVOPROVOJ

Mi ne havas pretan kaj miraklan solvon, sed povas nun doni kelkajn pripensojn pri la afero.

La impostoj, kiuj kovras la elspezojn de la ŝtato (ŝtatoficistaj salajroj, armeo, dogano, juĝistaro, polico, impostoficoj, kiuj estas nepraj ŝtatzorgoj, al kiuj oni povas aldoni la ĝeneralajn asekuojn por emeritoj-kaj malsanuloj, ĉio tio estas kion oni povas nomi "ĝeneralaj kostoj de la ŝtato". Fakte, ili aldoniĝas finfine al la "ĝeneralaj kostoj" de la produktivaj entreprenoj (kiuj jam estas komercokostoj, reklamo, entreprenaj oficistoj, direktoroj, akciuloj, interezoj de la pruntoj, ktp.). Tiu aldoniĝo malfortigas la konkurencofortojn de ĉiu entrepreno, ĝi do tendencas al pliigo de senlaboreco, kaj devas esti kiel eble malaltigita. Oni do povas diri ke malaltigo de la impostoj altigas la konkurencofortojn kaj malpliigas la senlaborecon: tiel faris Prezidento Reagan kiu en Usono malgrandigis la senlaborulonombrojn je 12 500 000!...

LAFER per statistikoj montris ke malpliigo de impostprocento malpliigas la senlaborecon, kaj sekve altigas la nombrojn da dungitaj senlaboruloj, kreskigas la prosperon de la produktivaj entreprenoj, tiel ke malpli alta impostprocento povas rezultigi pli altan impostrendimenton, tiel ke la ŝtato ricevas proksimume la saman ĉioman sumon pro pligrandigo de la impostpagantoj kaj redukto de la sociaj helpoj...

Maurice ALLAIS (Nobel-premiito pri ekonomio 1989) rimarkigis ke la imposto pri enspezoj estas kontraŭekonomia, ĉar tiel oni "punas" la riĉaĵproduktantojn pro ke ili pliriĉigas la nacion. Ekonomie pli logika estus imposto pri konsumado, ĉar tiel oni malfavoras la homojn, kiam ili forprenas por si naci-riĉaĵojn. Certaj proponis imposti la personaĵajn elspezojn per imposto de la diferenco inter la enspezoj kaj la investoj kaj kresko de ŝparkontoj.

Antaŭ la milito Eugène SCHUELLER, estro de la prikosmetika entrepreno L'OREAL, proponis anstataŭigi la imposton pri enspezoj per imposto pri energikonsumado (elektro, gaso, petrolo) por

malakceli la anstataŭon de la homo per maŝinoj, kaj ekzalti la strebojn al energisparo. Ni ne forgesu, ke la problemoj pri impostoj estas pli gravaj ol oni unuavide pensas: Pro tiu nesolvita demando eksplodis la Granda Franca Revolucio de 1789a, kiu cetere ne sukcesis solvi ĝin, tiel ke ĝi finiĝis per granda bankroto: en julio 1794a la tiama bankbileto ("assignat") ankoraŭ valoris 33% de la nominala valoro, sed unu plian jaron poste, ĝi valoris nur 3% de tiu nominala valoro!! (Floria Aftalion: "L'économie de la Révolution Française").

Pri la socio ĝenerale, Friedrich HAYEK brile montris en sia libro "La Vojo al Servuteco" (La voie de la servitude), ke se oni perfortas la homan naturon, kiu ne estas altruismo, sed avido al lukro, propra aŭ familia, aldire, se oni ne utiligas tiun naturan emon de la homo por se eble servi al la prospero de la komunumo, devige oni perfortas ankaŭ la liberecon. Montriĝis ke la plej alta rendimento estas atingita nur per liberala organizo, kio estas libero entrepreni, tiam oni povas kuiri la plej "grandan kukon". Komprenibile, oni povas ion mildigi la plej grandajn krudaĵojn per forpreno de iom el la kuko por helpi al la kontraŭvole postgintaj naciianoj, sed oni devas ĉiam atenti, ke la libera kukparto restu sufiĉe granda por lasi motivojn al la entreprenistoj, kiuj estas la solaj veraj motoroj de la progreso de la socio.

Konkurenco estas la natura senpartia instigo al progreso, tial monopoloj ĉiuspecaj estas kondamnindaj, ĉar ili estas forta bremsilo kontraŭ ĉia progreso kiun fine profitas ĉiu, la salajruloj kiuj grupe povos pridiskuti la atribucion de la plibonhavo de la entrepreno, kaj ankaŭ la aliaj postgintaj, ĉar se la tuta kuko grandigas, kreskas ankaŭ ĉiu parto.

Tiel ĉiu civitano devas ricevi de la socio, krom ĉian labormonon, strikte minimuman bonhavyon por sin nutri, vesti kaj loĝi kun familio. Tiu disdono estu strikte minimuma por ne emigi al mallaboremo, kaj rezervita al samnaciianoj aŭ al anoj de nacioj, kiuj kontrakte reciprokas samnivele.

En kontraŭa direkto oni devas difini la regulojn de la ekonomia ludo, tiel ke neniu

povos sin riĉigi per nura monmanipulado: spekulacio kreas monon sen responda kreo de konsumebla riĉaĵo (en la plej ĝenerala senĉo); mono estas nur mezurilo, signo por intersanĝi oferatan laboron kontraŭ dezirata konsumaĵo (ankaŭ teatro estas konsum-aĵo). Do, kreo de mono vidalvide de samkvanta konsumaĵaro signifas malvalorigon de la mono; tio estas inflacio, kio estas ŝtelo depremita de ĉiuj...

Tial la proponoj de Maurice ALLAIS, Nobelpremiito pri ekonomio strebas al impostoj favoraj al ekonomikresko kaj al forpreno de la inflaciaj profitoj favore al la ŝtato. Liaj proponoj estas radikalaj kaj unuavide surprizas, sed post ripensado ili ŝajnas indaj je serioza trastudo.

A. 1. Li unue proponas ke estu forigataj ĉiuj impostoj pri enspezoj: t.e. ankaŭ la impostoj personaj pri enspezoj, la profitimpostoj pri komerco, industrio, agrokulturo, heredaĵoj, obligacioj, akcioj, prunto-rentoj, ke ne okazu duoblaj impostoj.

Anstataŭe li proponas imposton bazitan sur la materiala kapitalo por instigi ties posedantojn produktigi ĝin. Ni vidas poste ke la propono pri tiu nova imposto estas tre modera. Temas nur pri materiala kapitalo, kiel domoj, terenoj, uzinoj, ekipaĵoj, bienoj... Kontraŭe, la konsumantoj alproprigas al si parton de la nacia riĉaĵo, do estas juste ke pro tio ili pagu al la komunumo kaj ke la ŝtato impostu la konsumantojn.

2. Inflacio estas ŝtelo far la prunteprenintoj al la pruntedonintoj. Por sin garanti la bankoj pruntedonas kun interezoj, kiuj larĝsekure entenas la riskojn, kio akcelas la inflacian tendencan.

Plie, la bankoj, per siaj pruntedonoj kreas artefaritan monon sen kontrolo per sia nura profito: el tiu kreo, parto reprezentas inflacion, kaj alia parto disvolviĝon de la ekonomio. Monkreado devus esti privilegio de la ŝtato.

Pli malbone, la bankoj, ludante kun la grandnombra lego ankaŭ pruntas el la deponoj en kontanta mono, kio estas granda risko de malekvilibro.

B. Pro tio Maurice ALLAIS aldonas al sia propono pri imposto al kapitalo dispoziciojn por tute malebligii krei monon, ekster la ŝtatbanko; ili estas:

1. ke la ŝtatbanko (Banque de France) estu pli sendependa de la registaro, sed regata de kreditkonsilio.

2. ke estu privataj deponbankoj, kiuj ne rajtas pruntedoni, sed ricevi nur likvidajn deponojn plene kovratajn per mono; tiun

monon ili prunteprenos de la ŝtatbanko je kosto 2-procente pli malkara ol unuarangaj obligacioj por kovri la funkci-kostojn. Ili kreas ĉekojn, pagkartojn, ktp., kaj postulos de siaj klientoj la verajn kostojn de siaj intervenoj.

3. ke estu privataj pruntobankoj, kiuj pruntos tiel ke ĉiomaj investoj kaj ĉiomaj ŝparoj estu proksimume samdaŭraj. Por ekspansio, ili prunteprenos de la ŝtatbanko monon je kosto egala al unuarangaj obligacioj.

Ĉiuj deponoj 3-monataj aŭ malpli longaj estos rigardataj likvidaj.

Tiamaniere, ĉia monekspansio estos regata ekskluzive de la ŝtatbanko kaj de ties aŭtoritatoj, kaj ĉiu monprofito venanta de monkreo revenos al la ŝtato. Por kontroli la ekvilibrojn, necesas ke restu rezidua prezaltigo taksebla je 2%, tiel por lezi nenium, ĉiuj daŭraj kontraktaj estos indikreferencitaj.

C. Praktikaj aranĝoj

Nur la materialaj kapitaloj estos frapataj per la nova imposto, anonime. Ĉiun jaron, ĉiu posedanto, ĉu individuo, ĉu societo, deklaras la valoron de sia posedaĵo (materiala) katastrore en la loko kie situas la posedaĵo. (*)

Oni ne rajtos viziti la bienon, sed la ŝtato povos proponi aĉeti la posedaĵon je prezo 40-procente pli kosta ol la deklaro, same, ĉiu individuo rajtos aĉetproponi je prezo 50-procente pli kosta, el kiuj 10 procentoj revenos al la ŝtato.

La posedanto rajtos ne vendi, sed refari sian deklaron laŭ la prezpropono; kaj pagos punon de 5%, se la aĉetproponinto estas la ŝtato, aŭ 10% se ĝi estas privatulo, el kiuj 5% iros al la ŝtato.

Maurice ALLAIS kalkulis, ke sufiĉos imposto je 2% de la kapitalvaloro, plus la repreno de la monkrea profito por kovri la forigon de la enspezimpostoj, ke oni povos eĉ iomete malaltigi la konsumimpostojn, kaj ke, krome, oni povos ŝpari multajn impostoficistojn. Tiuj proponoj de Maurice ALLAIS fontas el trastudo kaj esploro de multaj statistikoj francaj sed ankaŭ de Usono, kie la studoj kaj statistikoj estas pli precizaj kaj pli multnombraj. Ili estis pridiskutitaj kun ĉiuj eminentuloj pri ekonomiko, kaj

(*) Tia imposto, strikte proporcia, ne trafos la personojn aŭ societojn, sed senpere la materialajn objektojn (samkiel la konsumimpostoj), diŝe, kie la bienoj situas.

ne senkaŭze li estis Nobelpremiito. Pro tio mi kredas ilin tre valoraj, kaj ke ili entenas du gravajn avantaĝojn: 1) Tio estus certe instigo al ekonomi-progreso, kiun ni tre ege bezonas kun 2 600 000 senlaboruloj. 2) Ili metos iomete pli da justeco en la impostadmetodo ol nun. Ili laŭ mi havas grandan malavantaĝon: ilia realigo estus vera revolucio kaj "lezus" multmultajn, kiuj profitas de la nuna faro, pro tio mi dubas, ke ili povos esti aplikataj sen gravaj politikaj ŝanĝoj; plie, la riĉigo de plej multaj politikistoj mem estas farita el "materiala kapitalo"... (*)

Pro tio ni devus iomete paroli nun pri politiko mem.

4. PRI POLITIKAJ ORGANIZMOJ

Legfaraj kaj kontrolcelaj ĉambroj - Kritikoj kaj proponoj.

Franclando "profitis" de sinsekvo de reĝimoj de post 1789, kaj speciale de respublikoj, el kiuj la unua naskiĝis oficiale la 22an de septembro 1792a, kaj donis al si konstitucion, kiun ĝi neniam aplikis; la dua daŭris tre mallonge, la tria kontraŭe daŭris 70 jarojn kaj estis parlamenta reĝimo kun Prezidento arbitracianta, elektita de kaj elinter la du ĉambroj egalpovaj, do kun relativa ekvilibro; ĝi verŝajne ankoraŭ daŭrus, malgraŭ grandaj politikaj skandaloj, se ĝi estus preparinta militon, kiun ĝi kontraŭe deklaris (sen ĉipria voĉdono de la ĉambroj), kaj malhonore perdis pro tuta milita fuŝorganizado. La kvara estis parlamenta registaro kaj montris sin regno de la nuraj ĉambroj kaj de demagogio. La kvina, modifita de DE GAULLE, estis ŝajne kiel en Usono, prezidenta reĝimo, sed sen ekvilibro de la potencoj. En Usono, la Prezidento estas vere kaj efike kontrolata de la ĉambroj; plie, la unuigitaj ŝtatoj havas grandan liberecon preter la federacia povo, kiu sin limigas al centraj problemoj. La juĝistoj estas elektitaj, do sendependaj de la plenumpotenco, kaj radio kaj televido estis komence privataj entreprenoj. Tute alie estas en Franc-lando.

MONTESQUIEU montris, ke bona regado povas okazi nur se la 3 reĝimoj, legfaraj, plenuma kaj juĝdona, estas tute apartaj kaj sendependaj unu de la aliaj.

(*) Maurice ALLAIS: "L'impôt sur le capital et la réforme monétaire", 1989a, eidonis HERMANN, 293 rue Lecourbe, 75015 PARIS.

Nuntempe regas "nur"... granda konfuzo; kaj neniam Ludoviko la XIV-a estis tiom plenpotenca kiom François MITTERRAND.

4.1 La Prezidento

La plena regado apartenas nun nur al ununura sola homo: la respublikprezidento. Li ĉion decidas kaj kondukas kiel ĉefgeneralulo, kiu ordonas al ministrogeneraluloj; la ĉefministro estas nur lia stabestro; li ne plu estas kiel sub la 3-a respubliko arbitracianta inter la ĉefministro, kiu tiam havis la plenumpotencon kaj la ĉambroj, kiuj havis la kontrolon, nomumis la ĉefministron kaj povis fali ĉiumomente la registaron. Dume estas en Britlando; oni voĉdonas por la deputitĉambro per majoritata sistemo, sed kontraŭpovon posedas la "lorda" ĉambro, kaj la Reĝo, kiu ne regas sed povas arbitracii.

La tuta nacio balotas por la Prezidenteco, evidente, ĉar li estas nur unu homo, oni povas tion fari nur per majoritatismo, ĉu unufoja, ĉu plurfoja balotado. Sed nun pli malbone estas, ke oni elektis majoritatsistemon ankaŭ por elekti la deputitĉambrojn, kiu havis laŭ la konstitucion la lastan parolvicon, tiel ke minoritatoj ne estas reprezentitaj sed subpremitaj sen ebleco aŭdigi sin... Veraj kontrolo kaj diskutoj ne plu ekzistas; kiam la ĉambroj samflankas kiel la prezidento, ili blinde aprobas; se ne, ili povas blinde rifuzi. Antaŭ la 5-a respubliko oni defendis la majoritatsistemon por ke la ĉefministro povu regi la ŝtaton, sed nun la Prezidento regas kaj ne plu arbitracias, do tiu sistemo farigis tre malbona kaj malstabiliga por la ĝenerala politiko; samkaŭze la prezidentmandato farigis multe tro longa kaj devus kiel en Usono esti limigita al 4 jaroj. Plie, la Prezidento nun regas la juĝadministracion, ĉar li decidas pri agado aŭ ne de la prokuroroj (akuzjuĝistoj), kaj decidas pri la promocio de ĉiuj juĝistoj, tiel tute ne sendependaj; samtendence, li nomas la membrojn de la magistrat-konsilio (pri tio ni vidas poste).

Plie, li ankaŭ regas sur radio kaj televido pere de C.S.A. (supera konsilio pri aŭdvidado), kies membrojn li elektas tute sen kontrolo, cetere, li povas ankoraŭ pli rekte agi sur ili tra ŝtatsocietoj, kiuj disdonas pagreklamojn laŭ ŝtatindikoj...

Poste ni vidas kiel sendependigi la juĝadministracion kaj ankaŭ radion kaj televidon. Li daŭre elektos la ministrojn kaj eksigis ilin. Li povos peti la ĉambrojn prepari legojn, sed havas prioritaton en la laboro de la ĉambroj nur por la pridiskuto de la budĝeto. La ĉambroj povos lin eksigi per cenzura majoritato de 2/3

en ĉiu ĉambro, aŭ post referendumo eksiga.

4.2 La Ĉambroj

DEPUTITOJ. Ili devas nun kandidati por 4 plendaj jaroj, kio favoras nur tiujn, kiuj havas laborgarantion, kiel Statfunkciuloj, profesoroj ktp, kaj plie advokatoj kutimaj pri parolo kaj kiel deputitoj akiras klientojn.

Ili uzas 80 % de sia tempo por akiri de la administracioj favorojn por siaj balotintoj, kio estas malmorala kaj pardon malfermas al ĉiuj kompromitiĝoj kaj bakŝiĝoj.

Alia samorigina malbono estas, ke ili farigis, ĉiuj aŭ preskaŭ ĉiuj, profesiuloj kiuj rigardas unue la avantaĝojn kaj profitojn de sia politika profesio pli ol la nacian intereson. Ili preskaŭ ĉiuj igis tre riĉaj sen profitdona kompenso por la ŝtato (almenaŭ inter la ministroj aŭ eksministroj). **MITTERRAND** laboris nur 6 monatojn kiel advokato, kaj unu jaron kiel direktoro de monatgazeto "VOTRE BEAUTÉ" pro amikeco kun ties proprietulo Eugène Schueller. Plie, li verkis 3 aŭ 4 librojn pri politiko, kio estas la tuta produkta laboro en sia tuta vivo, post kio li pretendas reprezenti la manlaboristojn, predikas por egaleco sed igis (kiammede?) kapitalriĉulo posedanta grandan domon sur strato de Bièvre en la centro de Parizo, valorantan plurajn milionojn da FF, bienon en Latché (sude de Bordojo) kaj laŭdire domon en Hispanlando... Lia aliaj ankaŭ ne restis malriĉaj: **LANG** "akiris" grandan apartamenton sur placo des Vosges (de Vogezoj), eble la plej multekosta loko en Parizo. **CHIRAC** aĉetis kastelon en Bity. Ankaŭ **GISCARD** havas kastelon, sed li jam estis riĉa, ĉar lia edzino estas filino de **SCHNEIDER**, kaj kompreneble oni parolas nur pri tiuj, kiuj estas en frontvido.

Ĉu vere demokratece (povo de la popolo) ke oni ĉiun kvaran jaron estas invitita voĉdoni por persono, kiun oni persone ne konas, kiu simple sin prezentis kandidato de ajna partio, al kiu la tre granda plimulto ne anas, kaj tio sen posta kontrolo dum 4 jaroj? Ĉu demokratece, ke ekzemple la deputitoj voĉdonis por abolicio de la mortpuno sen delegacio por tio, kaj eĉ kontraŭ la ĝenerala volo de la publiko?

Kio puŝigas la aferon pri la deputitoj, tio estas ĉefe, ke ili kandidatiĝas, kio estas jam komenco de ekprofesiado, sed signifas ankaŭ ke ili devas serĉi subtenantojn, apogantojn, kaj por tio promisi favorojn, aniĝi al partio, kio estas sindikato de politikprofesiuloj, sed kiu forprenas certan parton de ties libereco...

Laŭ mi, la solvo estas la nekandidatiĝo. Por tio, la homoj, por kiuj oni balotos, devos esti konataj de la balotantoj, do venantaj el malgrandaj grupoj, kio implicas duŝtupan balotadon. Tiuj grupoj estos profesiaj, ĉar oni pli bone konas la samprofesianojn de sia loko (urbo, vilaĝaro, ktp). La agrokulturistoj voĉdonos inter si, same la instruistoj, same la industriistoj (ili voĉdonos ĉu laŭ industrioj, ĉu laŭ ties industrireg-povo). La voĉdonado okazos laŭproportio, kaj oni tiel elektos ekzemple 24 000 grandajn balotantojn por 3 aŭ 4 jaroj. Tiuj lastaj elektos ĉiujare 400 deputitojn, kiuj devos konservi siajn laborojn. La ĉefa afero de la deputitoj estas la voĉdono pri la ŝtata budĝeto kaj impostoj. Depono de leĝo farebla nur de deputitoj aŭ senatanoj estos tre limigita, tiel ke la deputitoj bezonos ofici entute nur 2 monatojn en la jaro, kio estas sekuro por ke ili konservu sian produktan laboron. Ili estos eble ne reelekteblaj kaj ricevos kompencon por sia laborkariero.

Ĉiuj civitanoj devos trapasi ekzamenon pruvantan ke ili sufiĉe bone konas la francan lingvon kaj la elementajn aritmetikajn operaciojn (adicio, subtraho, multobligo, multonigo); nur la sukcesintoj rajtos voĉdoni.

SENATANOJ. Ili estos elektitaj por 5 aŭ 6 jaroj far la urbkonsilantoj, departament- kaj region-konsilantoj inter la urbestroj, departament- kaj region-prezidantoj, por sekurigi ke ili jam havas ekonomiajn nociojn. Estos po tri senatanoj en ĉiu departamento.

GENERALE: Transmaraj insuloj estos aŭtonomaj, do ne partoprenos al senatelektio, nek al deputitelektioj.

Ekonomia konsilio ne plu ekzistos: ĝi estus duoblaĵo de la deputitĉambro.

La leĝoj estos preparitaj de 1/10 de la deputitoj, t.e. 45 kaj 50 senatanoj, kiuj povas sin specialigi.

La popolo havos rajton pri referendumo post propono de 100 000 civitanoj voĉdonkapablaj. Plialtigo de impostoj devos esti konsentita de la du ĉambroj per absoluta majoritato, kaj oni povos ĉiam kontraŭreferendumi (kiel okazis antaŭ kelkaj jaroj en la usona ŝtato Kalifornio).

J. MANCEAU

(daŭrigota)

ĈIES VOĈO

PRI TELEVIDO

Karaj Ĉekamaradoj,

Min multe interesis via debato pri Televido (aŭ Televido): Ĝi pruvas almenaŭ ion, t.e. ke pli kaj pli da personoj, nuntempe, posedas uru tian aparaton.

Tiel, ĉiu el ni havis eblecon spekti kiom teruraj estas tiuj militoj kiujn, sur la tuta tero, suferas la homoj.

Mi pensas, ĉefe, pri la infanoj, kies senkulpecan prizorgas neniu el tiuj ŝtatestroj, kiujn la popolamaso stulte aplaŭdas, ĉiufoje kiam iu publikigas "venko-bultenon".

Infanoj amase, anonime, silente mortas dum bombadoj diverstipaj, se ne ekster ili sed, tamen, pro milito. Kiuj ne mortas, tiuj suferas, dum sia tuta vivo, pro vundoj ĉu korpaj, ĉu psiĥaj, kiujn ne plu eblos kuraci!

Poste, eblas aŭdi tiujn samajn ulojn fanfaroni kaj, publike, brakumi kaj kisi infancjn, dum oficialaj ceremonioj. Kia hipokriteco!

Por konvinki sin pri tio, necesas nur memori pri la pasintjaraj eventoj kiam, en la ĉefaj urboj, tra la tuta lando, organizis la infanoj protest-manifestaciojn por peti pli da lokoj por dece studi kaj pli da instruistoj, kiuj kruele mankas. Tiam, la Ministro pri Internaj Aferoj sendis al ili... tiujn samajn policistojn kiujn, poste, la flegistinoj devis fronti, same pro manifestacioj.

Estas tiuj ĉi policistoj speciale trejnita tiucele, por kontraŭstari manifestaciojn kaj tute ne gravas kiujn ili renkontas survoje. Pluraj el la infanoj estis, tiam, vunditaj kaj, por tion "pravigi", la Ministro pri Financaj Aferoj diris ke "kontentigi la infanar-postulojn grave endanĝerigus la tutlandan buĝeton"!!!

Ve! Tuj poste, komenciĝis la Golf-milito... kiun partoprenis Francio: El kie venis la mono tiucele? Tiam, neniu el niaj ministroj protestis, kio denove pruvas ilian

hipokritecon.

Do, iamaniere, utilas Televido : Dank'al ĝi, ni lernas tion, ke estas stulte fidi tiujn, kiuj regas nin : Ĉu tio ne gravas, laŭ vi?

Kamaradece Via,

K-do Joël Roger Laporte

PRE LA KRISTANA KRUCO

(vd. L196, p. 28)

Ke kristanoj estimas krucon estas ilia tuta rajto. Fido certe estas helpema en ilia vivo. Estas ilia formo de filozofio.

Sed ĉu vi ne pensas troigi en viaj asertoj?.. Vi rajtas kredi la legendon de Jesuo sed kiam vi volas kredigi ke li "batalis" por plibonigi la homaron, vi forgesas la verajn batalintojn, kiuj imagis tiun historion tute ne veran. Vi propagandas mensogon!...

Erari estas homa ebleco, sed propagandi mensogon estas krimo.

Homara stato pliboniĝis, jes. Ĉiam ĝi pliboniĝos. Sed ne estas fare de nur kristanoj. Ĉiuj homoj (almenaŭ mi pensas) laboras por plibonigo de la stato de ni kaj de niaj posteuloj. Dum jarcentoj ni konstatis ke religio bremsis la progreson, kaj ankoraŭ hodiaŭ estas tre diskutata de siaj propraj disĉiploj.

Vi volas kredigi al vi mem kiom krucifikso utilis al homaro. Ni daŭrigos niajn bonajn agadojn sen helpo de viaj mensogoj.

Ni preferas rigardi la problemojn fronte kaj vidi ilin kiel ili estas, ne tra misformantaj okulvitroj. Vivo entenas sufiĉajn komplikaĵojn. Ni ne ankoraŭ aldonu imagaĵojn.

Modesto



TUTMONDAJ GEKNABETOJ :

PARDONU NIN

Laŭte, ne estas necese aserti, estas taŭga publikigaĵo. Mi ĝojas legante ĝin, ĝiajn artikolojn, ĝiajn debatojn, kiuj, malgraŭ la pasio, rebrilas pro frateco.

Ofte, kiam oni diskutas pri naciismo kaj imperiismo, mi ne konsentas, sed mi ne povas koleriĝi ; ĉar kiel mi povus scii, ĉu mia frato malpravas, se mi silentigus lin? Kiel mi povus scii, ĉu ankaŭ mi eraras, se mi malvolus aŭskulti lin?

Mi konstatas, ke la raportistoj kaj la legantoj de L!, konscie aŭ nekonscie, sekvas la celon de tiuj ĉi demandoj.

Kiel aliaj, mi skribis ke ni, ĉiuj homoj, estas respondaj pri la malbono, kiu falas sur niajn kapojn. Tio estas ankoraŭ pli evidenta en demokratia sistemo, ĉar estas ni kiuj elektis niajn respektivajn registarojn, kiuj ne kapablas eviti militojn, maljustaĵojn, malsaton...

Sed ni, la homoj kiuj prijuĝas la agadon de niaj demokratiaj registaroj, estas ankoraŭ pli nekapablaj ol ili, ĉar ni eĉ ne intencas starigi universan movadon, kiu, per balotado, povu anstataŭigi per aliaj kapablaj registaroj.

Certe, ni la esperantistoj kiuj akceptas kaj alvokas dialogon, jam supreniris kelkajn ŝtupojn, sed la vojo estos longa ; ĉar kiel la homaro pliboniĝos, se la fosiliaj homoj, kiuj malhelpas dialogon, ne volas sekvi nian ekzemplon?

Bedaŭrinde, se ni dialogas (aŭ babilas kaj garolas) ni estas preskaŭ senefikaj. Ni povus peti de la tutmondaj geknabetoj, ĉefe de tiuj kiuj suferas pro milito, malsano aŭ malsato : "Pardonu nin pro nia senefikeco, pro nia neinteligenteco."

Mi diras, ke ni estas preskaŭ senefikaj, do, iomete efikaj, ĉar ni klopodas por malfermi la pardon de la vero. Ni malfarmas ĝin per la ŝlosilo de la dialogo.

Kiel uzi tiun dialogon por ke ĝi estu efika? Tie estas la malfacileco. Tamen ni provu, pensante ke dume la suferoj de multaj homoj plu daŭras :

Samideano Deker en "Frenezula afero : La Etna Naciismo" en L!96, konvinkas nek min nek iun naciiston, malgraŭ tiu ĉi tripaĝa artikolo.

Lia terminologio ne estas la sama kiel la mia. Sed tio ne gravas, ĉar la faktoj daŭras.

Mi asertas, ke naciismo estas doktrino kiu defendas la rajtojn de ĉiu popolo sen agresi aliajn. Imperiismo estas la kontraŭa doktrino kiu defendas imperion, ĉiun nacian ekspansion venkintan super la venkitaj, samtempe rifuzante la rajton je sindeterminado. Ĉar kiom daŭrus okupado super invadita teritorio, se ĉi tiu povus disiĝi senprokraste?

Do, generalo Franko, Hitler kaj Mussolini ne estis naciistoj, sed totalistaj imperiistoj. Dume, la Kastilia, Francia k.t.p. registaroj estas demokrataj imperiistoj.

Kompreneble, ĉi tiuj asertoj ne povos konvinki nian amikon Deker, kaj la efiko de ĉi tiu dialogo estas ke mi konvinku lin, aŭ ke li konvinku min komenci starigi la grandan movadon.

Mi daŭrigas : La popolo, kiu trudas sian lingvon kaj sian diktatoron al aliaj popoloj, estas nek paca, nek justa, nek fratema popolo, ankaŭ se ĝi ne agnoskas la premitajn naciojn, kiel Francio.

Unio ne povas esti, se ĝi ne estas ŝirmita per separrajto.

Unio ne estas sama kiel aneksado kaj premado.

Mi sentas ankoraŭ, ke mi ne povos konvinki nian amikon, eĉ se li legus libron mian.

Sed eble li povos konvinki min, se li eksplikus al ni : Kial la Portugaloj neniel volas reunuiĝi kun Hispanio (Kastilio) por esti zorgataj kiel siaj Galegaj ĝemelfratoj, kiel siaj Katalunaj fratoj, aŭ kiel siaj Eŭskaj kuzoj? Kial la Portugaloj ne volas reunuiĝi kun Hispanio, kaj volas partopreni en la lanta konstruado de Eŭropunio?

Mi finas tiun ĉi artikolon, esprimante, ke la sola celo de ĉi tiu dialogo estas la vero, kiu kondukos nin al unio, al frateco.

Rafael MARGALEF

Ĉu vi volus ekvidi dum Universala Kongreso aŭ alia E-kongres(et)o aŭ E-renkontiĝo egan, belan aerostaton (balonon) kun ega surskribo "ESPERANTO" sur ĝia tavolo-kovrilo kiu majeste, malrapidege fluas surĉiele?... Ĉu ne imponus la vidaĵo?... Kompreneble la balono estus videbla de malproksime... de multaj kilometroj...

Se ĉi ideo plaĉas al vi, skribu senprokraste al :

S-ro Marian ZDANKOWSKI, Pana Tadeusza 15 m.69, PL-10-461 OLSZTYN
POLSKA - POLLLANDO

EKONOMIO KAJ LIBERECO

Kelkaj rimarkoj pri la artikolo de J. Mangeau (L196).

Pri la historio. Kial la ĉefa temo de la revolucio de 1789a estis la libero? Ĉar la burĝoj celis forĵeti ĉion, kiu malhelpas ilian disvolviĝon (la aristokratan povon, la katenigajn kutimojn, la malliberan cirkuladon de la varoj). Iial ili simpatiis al ĉiuj teoriuloj, kiuj havis ideojn pri tiuj problemoj. Do estis pli la materia stato kaj grado de disvolviĝo de la socio, kiuj okazigis la revolucion, ol la teoriuloj kiuj tamen ludis gravan rolon. En tiu periodo la liberala ekonomio, la akra konkurenco estis faktoroj, kiuj taŭgis por progresigi la antaŭeniradon de la socio.

En tiu komenca manufakturigo, industriigo, la unuaj ekonomikistoj komprenis, ke tiu merkata ekonomio estas faktoro, kiu instigos al progreso. Sed Ricardo (Rikardo) komprenis, ke la kapitala akumulado estas des pli granda ju malpli oni pagas la laboristojn. Ĉu Fourier, Saint-Simon, Proudhon, estis radikalaj revoluciuloj? Pli kutime oni ilin nomas : utopiaj socialistoj. Ili revis aŭ provis pli sociale strukturigi la socion. La regado de Napoleono la III-a koincidis kun periodo de disvolviĝo de la burĝaro. Ĉu li favoris la laboristojn? Pli vere la ekonomia disvolviĝo postulis pli grandan grupigon de laboristoj, ili organiziĝis en mutualoj, sindikatoj, kooperativoj kaj agadis, tiel akiris pli bonajn vivkondiĉojn kaj liberecojn.

Karlo Marks havis grandan influon en la laborista movado. Eble oni devus pli ĝuste prezenti liajn teoriojn.

1. Estus pli bone anstataŭigi la vorton salajro per sumo de labortempo aŭ laborhorojn. 2. Oni ne bone povas kompreni la duan, se oni ne konas la teorion de la interŝanĝa valoro de la varoj. Ĉiu laboro aldonas interŝanĝan valoron al la varo. Iel per sia laboro la laboristo aldonas interŝanĝan valoron al la produktita varo. Sed la mastro pagas al la laboristo nur por lia vivteno. Ĉar la interŝanĝa valoro aldonita estas pli granda ol la salajro pagita al la laboristo. Tiu plusvaloro fariĝas posedaĵo de la mastro. La prezoj estas la interŝanĝa valoro esprimata en mono. Por ĉiu varo ĝi inkludas la tutan sumon de labortempo necesa por ĝin produkti. En la merkato ili varias pli-malpli sed la tendenco estas proksimiĝo al la interŝanĝa valoro.

Ĉu estas "bronza leĝo", ke la laboristoj fariĝos pli kaj pli mizeraj? Kiel Marks vidis la aferon? Li vidis, ke la mekanikigo kaj koncentrado de la laboro faris la produktivecon pli granda.

Oni produktas pli per malpli da laboristoj. Iel malpliiĝas la interŝanĝa valoro kaj la malmodernaj entreprenoj bankrotas. Iel estas multaj senlaboruloj. Kiam sur la labormerkato (disponebaj laboristoj) estas multaj latopetantoj, estas pli facile por la mastroj pagi "mizerajn salajrojn". Feliĉe, la laborista movado kaj la bezono je ĉiam pli kvalifikitaj laboristoj faris tiun "bronzan leĝon" ne tute vera.

3. Paroli pri "ŝtelo al la salajruloj" estas iom simpliĉi la problemon. Eble Marks kaj marksistoj tro krude prezentis la aferon. Doni al ĉiu produktanto egalvaloron de lia produktita interŝanĝa valoro ne estus praktika afero. Necesas rezervi parton por la entreprenaj bezonoj, por la socialaj servoj kaj asekuroj, por la kontribuo al ĉiuj kolektivaj bezonaĵoj. Se restus suplemento, ĝi fariĝus posedaĵo de la socio, ne de kapitalisto.

4. Klaso kontraŭ klaso. Estis bela revo, ke la laboristoj unuiĝos. Mi preferas, ke oni parolu pri unuiĝo de ĉiuj, kiuj deziras socialan ordon ebligantan vivon en paco kaj bonstato. Tamen plaĉas al mi la vortoj "laboristoj (Proletoj) el ĉiuj nacioj unuiĝu."

5. Eble Marks iluziiĝis pri la facileco konstrui komunismon, kaj ke ĝi fariĝos kvazaŭa paradizo.

Kial fiaskis Sovetio? (Sovetio, ne komunismo, ĉar ne ekzistis vera komunismo). Ĉu pro aspiro al egaleco? Eble tiu aspiro estus malprudenta, sed tio ne estas la kialo de la fiasko. La ĉefaj kialoj estis la nivelo de disvolviĝo de la lando, tiom de la industrio kiom de la popola kulturo. Poste, la longdaŭra civilmilito. Tria, la strukturo de la komunista partio kaj de ĝia estraro. La aŭtoro prezentas la komunismon kiel egalecan socion malkapablan evolui, kaj iom same pri Duboin. Mi opinias, ke temas ne pri absoluta egaleco, sed nur malpliigi la diferencojn, ĉefe anstataŭigi la regadon de la kapitalposedantoj per demokratece elektitaj reprezentantoj de la popolo. Laŭ Duboin, anstataŭ uzi la eblecon abunde produkti por forĵeti aktivulojn el la produktado, oni utiligos ĝin por disdoni al ĉiuj enspezojn, eĉ se la laboristo ne havas laboreblecon. Ne temas pri egaleca mizero sed pri pli ĵusta dispartigado de la produktitaj riĉaĵoj.

Nuntempa situacio

En la nun atingita stadio ne plu valoras la liberala sistemo. Ni vidas kiel ĝi donas grandan senlaborecon, mizeron apud forĵeto de produktitaĵoj. Ĉu ni estos kapablaj trovi bonan solvon?

Jen malfacila, sed necesa tasko. Eĉ en liberala ekonomio intervenas la ŝtato, sed laŭ la kapitalista vidpunkto. La financa kapitalo estas tŭtpotenca. En la ekzemploj de la siderurgio kaj Renault-aŭtofabriko, ne kulpas la laboristoj, almenaŭ ne tute, sed pli la normala evoluo de la kapitalisma sistemo, kiu atingas maturecon. La aŭtoro estas favora al liberala ekonomio, kiu per la merkataj leĝoj ebligas ĝustajn prezojn kaj reguligas la produktadon. Fine estas la plej bona solvo por progresigi la vivkondiĉojn. Mi tute male opinias. Ankaŭ Marks vidis la senhaltajn ŝanĝojn de la mondo, ke ĝi estos malstabila kaj progresos per sinsekvaj krizoj. Se li eraris pri kelkaj punktoj aŭ antaŭvidoj, oni tamen povas ĉerpi el lia verko bonajn instruojn.

O.P. (Tarnac, 2.01.92)

HEREZAĴO

En ĉi tiu artikoleto mi imitas al Eugène Aristide Alfred ADAM (1879-1947), pseŭdonime "E. Lanti", kiun mi admiras. La legado el liaj verkos ŝanĝis mian vivkoncepton.

Li estas unu el la homoj, kiujn mi neniam konis persone kaj tamen kiuj donis alian direkton al mia vivo. Apud li troviĝas Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859-1917), Georgo Ivanovitch Gurdjieff (1866-1949) kaj aliaj.

Esperanto estas facile lernebla lingvo en komparo kun la naciaj. Mi dediĉis multajn horojn al la lernado de angla kaj franca lingvoj, sub gvido de eminentaj profesoroj, kaj mi scipovetas ilin.

Esperanton mi lernis aŭtodidakte kaj mi, pli-malpli, scipovas ĝin. Tamen...

Tamen, se Esperanto (vere Esperantistoj) daŭrigas sur la vojo enkonduki tute ne necesajn neologismojn, opozicii al la uzo de la prefikso "mal" kaj al kunmetitaj vortoj, baldaŭ nia kara Esperanto fariĝos pli malfacila ol kiu ajn nacia lingvo.

Kaj nun sekvas la herezaĵo - kaj mi petas pardonon pro tio -, ĉar mi metos skribe kion mi pensas, kaj parolos ne tre favore pri iu aŭtoro, kiun la plejmulto konsideras koloso.

Mi petegas, ke vi pardonu min..., sed la unua kaj ĉefa fuŝanto de nia lingvo estis d-ro Kolomano Kalocsay (1891-1976). Li faris multajn tradukojn, sed por pretigi ilin li enkondukis amason da neologismoj.

Poste li estis (kaj estas) fervore imitata de fipoetoj kaj eĉ prozistoj. (Iuj el ili estas Akademianoj).

Fronte al Kalocsay troviĝas Antoni Grabowski (1857-1921), kiu faris tradukojn el multaj lingvoj (legu: El Parnaso de Popoloj - Poemaro) uzante la Klasikan, la Zamenhofan Esperanton.

Kompare al Grabowski, Kalocsay ŝajnas pigmeo.

Afablaĵn salutojn al ĉiuj gelaŭtuloj!

A. Lopez Luna

LA BONA LINGVO

Kiam ajn mia menso okupiĝas per lingva problemeto aŭ per lingva intereso (cetere ĉiujn lingvajn karakterizaĵojn mi trovas interesaj), mi unue verketas la temon kaj nur poste informiĝas legante faklibrojn pri la afero. Mi faras tion, ĉar en mia disverketado de la temo mi deziras ne esti influata pli ol mi jam estis antaŭe. Post legado de fakliteraturaĵoj mi revenas al mia verketajo kaj eble ĝin iom ŝanĝas.

Tiukiala mi longe daŭrigis ne legi "La bona lingvo" de Claude Piron : mi deziris provizore ne esti influata de liaj ideoj, kiujn mi suspektis esti proksimaj al la miaj. Kelkiuj trovas min timema, timema ke mi estos tiom mensmalforta ke mi perdos mian sendependan rezonadon. Fakte mia motivo estas ke mi tre ŝatas la dialektikon kaj ĉiam deziras akre finpensi temon por apudmeti ĝin apud kontraŭan aŭ similan disvolvon de la problemo kaj poste trovi, ne la kompromison, sed la per la komparo plibonigintan sintezon de la konsiderspecoj. Protime aŭ ne, tiel mi verketas, nome iom fanatike enkomence, kaj poste mildigite.

Sed fine, antaŭ kelkaj semajnoj kaj pro daŭra menciado, mi devis legi kaj juĝi la Piron'ajon. Intertempe, antaŭ unu aŭ du jaroj, mi legis en "Laŭte!" recenzon pri ĝi. Ĉar mi ĝenerale fordonas miajn Laŭte-ekzemplerojn en malriĉaj landoj, mi bedaŭrinde ne plu havas la numeron kun la recenzo, do ne scias la nomon de la aŭtoro. Sed mi bone memoras i.a. ke li tre akuzis Piron pri malobjektiveco kontraŭ kaj eĉ pri persona malsimpatio kontraŭ Gaston Waringhien. Nu, nun leginte la libron, mi devas diri ke ankaŭ min trafis la apud la fino relative ofta traktado de ideoj de Waringhien. Tamen mi sentas ke Piron devis, eĉ devegis, fari tion pro la jenaj kialoj.

Unue estus malhoneste indulgi la por Esperanto tre seriozajn erarojn de homo simple pro ties aliaj grandaj kaj pozitivaj laboroj favore al la lingvo... Ĉiu, kiu multe laboras, faras erarojn, kaj se tiuj kelkaj eraroj hazarde estas tiom ege kontraŭaj al la spirito kaj danĝeraj al la bonfarto de Esperanto, necesas neindulge kaj daŭre kritiki ilin, speciale ĉar la eraraj ideoj venas el fama Esperantisto kaj tial emas akceptati blinde de la kara kaj malkritikema Esperantistaro.

Due, ĝuste ĉar Waringhien estas konsiderata ne kiel fanatika Esperantulaĉo, t.e. neologismulo kaj gramatik-ŝanĝulo, kaj tamen, certe nekonscie, kreis la Esperantologian bazon por tio (same kiel Lenin nekonscie kreis la bazon por la Stalin'ismo), estis bona la ideo kritiki lin kiel reprezentanton de la tuta gamo de Idisto-similaj "adaptuloj". Estas laŭ mi pli utile klarigi la erarojn ĉe la sciencaj iniciatintoj ol ĉe la fanatikaj kontraŭ-Esperantecaj posteuloj (inter kiuj estas pluraj Akademianoj!);

Trie, kie Piron kritikas la rezonmanieron de Waringhien li klare indikas ke estas ne pro speciala "malboneco" de Waringhien sed ĉar tiu estas produkto de la tipe francaj edukistemo kaj kulturpraktikado.

Konsekvence, min tute ne naŭzis la pluraj kritikoj ante k-don Waringhien, kiu cetere situas tre simpatie en mia Esperantologia kaj sennacieca koro.

Marcelo Leereveld.

BIOSFERO 2

*Gevolontuloj ok el Arizono
Du jarojn solos en dezerta zono.
L'arkeon praan realtempigonte.
De tropikfloro, verda ĝis gazono,
De Di-besteto, blanka ĝis kaprino
Ekkuntuŝiĝas ĉiu vivsezono.
Kuraĝa veto esti Robinsono
Izola en planed' miniatura!
Ĉu el l'arkeo fora en Usono
Ĝam venos sav' al blua la planedo?
Sav' por naturo? Sav' por hompersono?*

S. BONIOL

LA DEMOKRATIO, ĈU PANACEO ?

Nun oni aŭdas senĉese paroli pri demokratio. Teorie demokratio estas ideala, sed bedaŭrinde praktike estas tute alia afero. Necesas distingi du kondiĉojn, en evoluantaj landoj kiel en Francio, kaj en Tria Mondo.

En Francio, ĉiuj plenkreskuloj rajtas voĉdoni, kaj ĝenerale la instrunivelo estas sufiĉe alta : ĉiuj scipovas legi, skribi ktp. Tio ne signifas, ke ĉiuj havas bonajn konojn pri ekonomio kaj politiko. Fakte proks. 50% el la voĉdonantoj ne interesiĝas pri tiuj temoj, almenaŭ ne pristudis ilin, tio estas unua punkto. Oni voĉdonas por baloti la urbajn konsilantaranojn, la deputitojn, kaj nun la prezidanton de la respubliko. Ĝenerale la kandidatoj estas sufiĉe kleraj homoj, sed estas ankaŭ malhonestaj ambiciuloj, kaj ne ĉiam kapabluloj. Ili havas aŭ ne havas politikajn opiniojn, sed ĉefe personajn ambiciojn. Ifoje ili estas monavidaj, honoravidaj, aŭ potencavidaj. Ĉiokaze la dramo estas ke post la balotado ili faras kion ili volas, estas nenia kontrolo. Ekzemple S-ro Mitterrand, la nuna prezidento, antaŭ ol esti balotita, promesis multe : iri al socialismo kaj redukti senlaborecon, kiu estas vera plago en Francio. Nun estas proks. 3 000 000 senlaboruloj kaj, laŭ la evoluo de la situacio, ni trafos 5 000 000 en la jaro 2000. Kompreneble, por redukti la nombron da senlaboruloj ne sufiĉas paroladi, necesus gravaj reformoj, celi al socialismo. Tion li tute ne faris, kvankam ni balotis por li tiacele.

En Francio antaŭe estis parlamenta respubliko, la III-a kaj la IV-a, sed tio fiaskis pro la nekapablo de la parlamentanoj akordiĝi. Estis senfinaj disputoj kaj malmulte da rezultoj. De Gaulle starigis prezidentan respublikon, en kiu decidas la prezidento kaj la ministroj. Dank'al la kapablo de De Gaulle kaj, oni devas aldoni, la favoraj ekonomiaj cirkonstancoj, tio funkciis sufiĉe bone. Sed forpasis la jaroj kaj la ekonomio difektiĝis kaj la situacio fariĝis pli kaj pli malbona. Nun Mitterrand tute ne kapablas restarigi la situacion. La partio socialista, kiu devus

helpi lin, nenion rajtas diri. La prezidento ne estas balotita de la partio sed de ĉiuj Francoj. Kompreneble, ĝis nun la Francoj preferas Mitterrand al Chirac (Sirak), kiu nenion plian farus, sed li subpremus perforte la strikojn kaj manifestaciojn. Mitterrand lasas striki senfine, senzorge. Do jen ekzemplo pri demokratio en evoluinta lando. Oni povus preni aliajn ekzemplojn, sed estus similaj situacioj.

En Tria Mondo, ekzemple en Afriko, estas tute alia afero. La demokratio, kiam ĝi ekzistas, estas embria, kial? Unue estas ofte 60% aŭ pli da analfabetoj. Ofte ne estas pli ol 10% da kleruloj kun supera nivelo, 20% - 30%, kiuj havas nivelon egalan al unuagrada atesto aŭ mezgrada. Ĝenerale la politikistoj estas koruptitaj pli ol imageble. En tiuj landoj ĝenerale ili havas tute falsan ideon pri mono. Kiam oni ne havas monon, tio ne tre gravas, oni vivas nur per produktitaj porvivaĵoj. Sed kiam oni havas oportunon havi monon, devas esti senfine, oni ne investas, oni amasigas, ĝenerale ekstere. Ne nur la politikistoj sed ankaŭ la funkciuloj estas koruptitoj; inter aliaj la doganistoj, sed ne nur ili, estas ŝtelistoj. Ĉiokaze la plej kapablaj, honestaj kleruloj ne restas en la lando, kie oni tre malbone pagas ilin. Ili dungigiĝas eksterlande, ĉu en naciaj organizaĵoj, ĉu en internaciaj : UNO, FAO ktp. Tie ili estas pagataj juste, ili havas materialon kaj bonajn kondiĉojn por labori. En moderna ŝtato oni eble pli bezonas bonan oficistaron ol bonan registaron. Faras la laboron ne la ministro sed la agentoj de lia ministerio. Eĉ siajn paroladojn la ministro ĝenerale ne mem redaktis, des malpli la antaŭajn studojn por la projektoj, la planoj ktp. Ankaŭ la subalternaj funkcioj estas nepre necesaj kaj postulas funkciulojn kapablajn kaj honestajn.

Fakte estas trompo diri, ke demokratio estas ĉefa afero. La ĉefa afero estas bona mastrumado de ekonomio, tiel ke ĉiuj ĝuu bonan vivnivelon, ke la progresojn profitu ĉiuj. En mia nun sufiĉe longa vivo mi vidis nur la Popolan Fronton fari ion por la popolo, en 1936-37. Estas tre malmulte. La aliaj registaroj faris nenion por la popolo. Kiam la ekonomio es-

tas prospera, ni havas iajn profitojn. Se estas ekonomia krizo ni despli suferas : la registaro brem-
sas la salajrojn sed ne la prezojn de la varoj. Evi-
dentaĵoj, kiujn ĉiuj povas konstati.

J. DEKER

Du poemoj de Valve LAAR, estona poetino-pedagogino

DECIDADO

Iri
aŭ ne iri.
Veni
aŭ ne veni.

Esti
aŭ ne esti...
Eble ne kapablas ni
vidi la celon
aŭ imagon
kiun atingi,
ne kapablas kompriri
la melodion,
sub kies akompano
la ŝtuphava vojo
de la penso,
kroĉante sin al unu
aŭ alia prenilo
difinas
mem siar sorton.

Difinas
sian iradon
aŭ ne-iradon
sian venon
aŭ ne-venon
kaj alvenos
el ne-estado
al estado,
kiom ajn malfacila
tio por ĝi re estu...

LA RONDIRADO DE LA TEMPO

La rondirvojon de sia tempo
pavimas ĉiu mem al si :

tra senfundaj marĉofontoj
de homa naturo,
tra ĝojoj kaj hontoj,
tra sia obstino,
tra sia cedemo,
forpuŝante de si
la ŝlimoplenan akvon
de mensogo kaj maljusto,
starante okul-kontraŭ-okule
tutsole mem kun si -
tago post tago
faro post faro
ŝtono post ŝtono
pavimante
la rondirvojon
de sia tempo.
Tiel komenciĝas
lernado,
la instruado de si mem,
tiel komenciĝas
la pavimado
de la rondirvojo
de sia tempo.

Tradukis Johannes Palu
el Estonio.

VINCENTA

Brunhara ridema Vincenta naskiĝis en Korsikio antaŭ 40 jaroj, studis masagarton en Florenco, edziniĝis kaj de 15 jaroj vivas en Francio. Tiel lertamova estas ŝi, ke ne tuj rimarkeblas ŝia preskaŭa blindeco. Se vi babilos kun la edzo, li konfidencos, ke ŝi perfekte mastrumas, kuiradas al li delikataĵojn, agrable muzikas, trikas por li komfortajn puloverojn, ktp., ktp. Mia amikeco al ŝi instigus min aldoni trian ktp, se troaj laŭdoj ne ĝenus ŝin. Mi tutsimple diros, ke de pluraj jaroj ŝi deĵoras sine de edukista skipo en arbarranda hipermoderna rekapabligejo por postakcidentaj blindiĝintoj ; tamen en esceptaj okazoj la fondaĵo malfermiĝas al denaskaj blinduloj aŭ malfortviduloj apartajn problemojn ĉefe psikdevenajn frontantaj. Kio lernindas tie ? Ĉio, cele al atingo - aŭ reatingo - de memstareco : distranĉi surteleran viandopecon, tajpi personan leteron, gladi ĉemizon kaj rekudri butonon sur ĝin, iradi sen gvidanto sur la stratoj dank'al lerte elpensita bastontekniko, eĉ uzi la urbajn trafikilojn. Kompreneble brajlopraktikado estas proponata, eĉ konsilata, ne nur kiel kultur- aŭ interkoresponda ebleco, sed kiel taŭga rimedo por akriigi la palposenson.

Se en tiu fako Vincenta trafas plenan sukceson, ŝi ĝin ŝuldas ne nur al siaj manlerteco kaj pedagogia talento. Ŝiaj dumstudaj en hospitalo kontaktoj evidentigis, ke nekomuna sentiveco kaj komunikkapablo ebligas al ŝi tujan kontakton kun la aliaj ; eĉ des pli facilas la kontakto, kiam ŝi antaŭsentas en la kunparolanto ion dolorportan aŭ psike laman.

Ĉiumatene kune kun labradorrassa gvidhundo, karamelkolora kvarpiedulo pli inteligenta, ol multaj dupieduloj, ŝi, enpaŝinte la enirpordon, bonhumore rondsalutas kaj sin direktas al sia "brajlejo". La obe-
ema besto kuŝiĝas en angulo sur molan tapiŝeton kaj dormas dum la kursodaŭro. Tamen se envenanta en ĉambron brajlostudanto ĝin vokas, ĝi surkruriĝas, vosto-

svingas kaj ĝentile alproksimiĝas por prezenti glatan dorson al la provhezita mano.

Antaŭ unu jaro estis akceptita denaska malfortvidanta 35-jarulino, kiu de la infanaĝo vivis kun maljuniĝantaj gepatroj kaj neniam frekventis lernejon. Finfine sub obstina premo de sociala asistantino ŝi konsentis veni tien por ses monatoj. Malglategis la unuaj kontaktoj. Ŝia sinteno konsistis el konstanta rifuzo rilate al ĉio kaj ĉiuj. En la manĝoĉambro kiam oni proponis al ŝi viandon aŭ frukton, ŝi rifuzis; ne tial, ke ŝi ne ŝatas, sed pro honto. Ĉar estas hontinde por 35-jarulino kun iom da vidkapablo scipovi nek senseligi piron, nek senostigi kotleton. Estas ja kialo por ene honti.

Kaj same pri la kontaktoj. Interparolado kun psikologino devigus ŝin esprimi sian profundan hontosenton, ĉar tiaj personoj lertiĝas en sekret-elpumpado. Ŝia senvaria respondo dum pluraj tagoj estis "ne", aŭ pli ĝuste: "dankon, ne" ĉar ne mankis al ŝi ĝentileco. Post semajno tamen ŝi iom malsovaĝiĝis sub kunigita influo de la blindulgrupo kaj edukskipo. Kiam temis pri brajlouzado pli seka estis la rifuzo, kun iom da senespero en la voĉo. Vincenta kun surlipa rideto tamen venis al ŝi:

"Martena, ĉi tie nenio estas deviga ĝis la momento, kiam vi propravole devigas vin. Tamen estu al mi plezure, ke vi venu en mian ĉambron - ni nomas ĝin ŝerce "brajlejo" - por kunbabili momenteton. Ĉu veras, ke vi originas el Nord-Italujo?" (Kaj post jesa respondo Vincenta direktis al Martena muzikoplenan italan frazon, ĉar perfekta du-eĉ trilingvulino ŝi estas, ĉar ankaŭ la regionan ŝi infanaĝe uzadis kun la geavoj.)

Pro ĝentileco Martena ne kuraĝis rifuzi, des pli, ĉar kortuŝis ŝin, ke iu ŝatas kaj praktikas ŝian devenlingvon.

Sed kiam Vincenta sugestis la elekton de senokupaj horoj por laŭgrada malkovro de la brajla sistemo, la hontosento estis pli forta ol la ĝentileco, kaj seke sonis: "pri tio, ne. Neniam." Profunde gravan perturbon, profundan enan luktadon malkaŝis tiu de-

fendokrio. Ĝian akrecon Vincenta perceptis kaj klarigis, ke temas nur pri iaspeca divenludo, ne per la vortoj, sed per la punktoj. Ŝi enmanigis al Martena tutnovan materialon, per kiu komencanto libervole konstruas hazardajn punktogrupojn, ĝis li estas kapabla enkapigi la ĝustajn literformojn kaj ilin laŭgrade uzi. Sed Martena abrupte repuŝis la materialon, kiu disfalis teren. Singultoj ŝin ekskuis, dum per hakitaj vortoj ŝi eligis la hontigan konfeson: "Mi scipovas nek legi, nek skribi, ĉar neniam oni instruis al mi."

Tiam Vincenta ĉirkaŭbrakis ŝin kaj etendis al ŝian naztukon por okulviŝi, dirante: "Ĉu nur pro tio vi ploras, kara? Sed bagatelaĵo ĉio tio! Se vi konsentos, mi proponos al vi ne nian kutiman divenludon, sed por vi mi elpensos trioblan, kiun ni kunludos kun vi. Vi do samtempe scipovos legi, skribi kaj brajlon uzi. Kaj mi vetas kun vi, ke post ses monatoj vi estos tiel lerta, kiel la aliaj. Ĉu vi faros al mi la plezuron provi?" Post kelkaj sekundoj sonis obtuza, sed firma "jes".

Spite ambaŭflankan plejbonan volon ne ĉiam facilis la triobla tasko. Kiam Martena eksentis, ke ĝi senpacientiĝas, ŝi vokis la tiel-nomatan "kvarpiedan kamaradon", frótadis sian vangon ĉe la dolĉa felo kaj flustris al ĝi: "Tiu stultas, kiuj parolas pri hunda vivo, ĉar ĝi ja pli facilas, ol la homa." Tamen post la sesmonata restado la veto estis gajnita kaj je sentohonto senpezigita Martena reiris al la gepatra hejmo kun pli optimismaj konsideroj pri sia estonteco.

Tri monatoj pasis. Iun belan vesperon, Vincenta elprenis brajlaĵon el la leterkesto kaj legis jene:

"Kara Sinjorino,

Kiel vi diris al mi, ĉiun tagon mi legis ne per la okuloj, sed nur per la fingroj, la libron, kiun vi donis, po unu paĝo. Mi finis ĝin kaj mi estas kontenta. Dank'al vi mi ne plu sentas min tiom stulta. Eble estos skriberaroj en mia letero, sed despli malbone, mi tamen volas sendi ĝin, ĉar mi ne plu hontas.

Dankon pro ĉio. Permesu, ke mi kisu vin. Kisu la kvarpiedan kamaradon sur la kapo.

Via Martena, kiu neniam forgesos vin."

Kiam la edzo envenis, Vincenta estis ploranta pro ĝojo.

- Kio estas al ĉi? li tuj demandis.

Ŝi laŭtlegis la naivan kortuŝan letereton kaj konkludis li: "Ĉu mi ne estas prava, kiam mi diras, ke vi ja estas sur la ĝusta loko?"

S. BONIOL

VIRO ENVENU

"Viro envenu", kial ne "Virino envenu"? Oni povas kompreni tion, se oni scias, ke ekzistas komercaĵoj, kiujn nur viroj bezonas. Kaj tiuj komercaĵoj, prefere tiu komercaĵo, kio kaj kia ĝi estas? Ĝi estas uzebla kaj nur luprenebla, kaj la saman multajn viroj, unu post la alia, povas uzi dum la sama tago.

- Diminie em pe - ĉiam eliras el la buŝoj de viroj aĉetantaj. Jes, ili petas, ke oni malpliigu la prezon. Nur viroj aĉetas kaj nur virinoj vendas. Tio povas mirigi multajn, sed spertuloj pri tiu komerco jam ĉion scias kaj komprenas. - diminie em pe - ridigis min tiun tagon, ĉar la franca esprimo - diminuez un peu - estis tiel transformata. Mi diris tiun tagon, **jes tiam**, kiam oni venigis min en la bazon. Kia rondo estis tie! Ĉiuj loĝejoj estis unufakaj kaj ĉe la enirejo de ĉiu fako sidis virino bone vestita. Rigardu ilin, ili movetas la piedojn intencante videbligi siajn kalsonojn kuŝantajn sur iliaj puboj. Ho, kiel mi revis! Ne, mi rezistu al tia logaĵo! Kia tentado! Kial samdomanoj devas venigi min tien? Mi nenion sciis pri tio, sed io bolanta en mia koro instigis min aĉeti. Mi forgesis, mi ne havis monon, kaj ĝi ne estis senpaga. Unua samdomano trafis sidantiron, ŝi ekstaris kaj ambaŭ eriris la fakon, la pordo fermiĝis. La dua samdomano same faris, la tria, la kvara, la kvina, la sesa, la sepa, la oka kaj la naŭa sekvis. Mi restadis sola

en la korto; tremante pro pirosuko ŝprucanta sur mian langon kaj eniranta mian koron, mi dormetis.

"Viro envenu", mi vekigis. Ho! La fako, kiun la unua samdomano eniris, malfermiĝis, ŝi vokas alian klienton. Rigardu la eliranton! Li tute ŝvitas kaj eĉ forgesis malovri la zipon de sia pantaloneto, li ridas. Ĉu mi estas ridinda? Ne, sed li estus imitinda. Se mi havos monon, mi samagos, ĉar mi anticipas ĝuas volupton. La dua eliris, la tria, la kvara kaj la kvina, ankaŭ la aliaj eliris. Ne, mi ne povas permesi al mi resti ĉi tie por vidi kiel samdomanoj senpezigiĝas; ili saltetis, kiel pilko. Prenu ĉi tiun moneron, diris la unua, ankaŭ la dua, la tria, la kvara. Tiam mi havis iom da mono povanta permesi al mi alproksimiĝi al la ĝiceto. Ĉu ne? Ne sufiĉe! - diminie em pe -, mi devis diri tiam. - Moa diminie em pe? - (ĉu mi malpliigu iomete?) "Eniru, vireto". Mi estis tiam dekokjara. La lito estis ege larĝa, kaj la virino ege sperta pri amorado, sed ŝi timigis min per siaj logaĵoj. Nenio elstaris antaŭ mi, ĝi estis tute kurtegiĝita de timo. per kio de mi povus palpi kaj ĝui la komercaĵojn? - Ĉu vi neniam gustumis? - Lasu min funkcii ĝin - Ĉirkaŭ duonhoro pasis, nenio okazis. He, eliru! Mi komprenis, VIRO ENVENU, sed VIRETO ELIRU. Ne, mi miskomprenis, ne ekzistas vireto, sed timemaj viroj nekapablaj pri tia afero estu tiel alnomitaj. Mi dronis en moko kaj ridoj, kiam mi atingis miajn kunulojn, ĉiuj jam atendas min. Mi tion faros pli poste, hodiaŭ mi timas la virinon, ĉar tio, kion ŝi montris al mi en la ĉambreto, estas blinda; ĉu vi vidis ĝin? Kio estas tio, kio elstaras en ĝi?

Jes, mi ne spertis pri tio, sed iam mi spertos pri ĝi. "Kio povas malpermesi al ĵusnaskito manĝi pli poste?" Mi ne kapablis flirti, nur amori mi povis per iom da moneroj, kiujn mi kolektis. Tiel mi aniĝis al la grupo de samdomanoj kaj la afero bone fartis poste. Ankaŭ mi plurfoje recitis "diminie em pe", kiam mi aŭdis "viro envenu".

GBEGLO Koffi

Red. noto: De nia togolanda amiko ni konsilas jenan libreton, originale verkitan en esperanto: **Mi vizitis grandan urbon**, (eld: Zamenhof Editores, CP 1531, BR-74.001 Goiânia-Go)

Mi edziĝis vendredon la 9-an de aŭgusto lastasomere en urbo Osaka, inter la 12-a 30 kaj la 2-a posttagmeze. 90 minutoj inklusive iron al la urbodomu kaj revenon lernejen per taksio. Kial do tiom rapide? Ĉar vendrede estis tiam mia plej laborŝtopita labortago kaj nur 90 minutojn mi disponis inter du kursoj. Tiu tempo apenaŭ sufiĉis por plenumi la dokumentojn japanlingve. Unu el la komplikaj estis transskribi miajn nomojn per la katakana alfabeto*. Se mi retransskribas miajn nomojn per la latina alfabeto, mi nun nomiĝas "Lobelu-Alekusandulu Kulabo" laŭ la japana prononco. Mia edzino ne bezonis uzi "katakana" ĉar Koreoj kaj Japanoj uzas "kanji"** por propraj nomoj.

Tamen, mi mensogas, 90 minutoj ne tute sufiĉis. Tiel, mi sole forlasis la urbodomon kaj rapidis al mia lernejo, eĉ malfruetis. Dume, mia novelino kaj la du japanaj atestantinoj finplenumis la dokumentojn.

Kiuj estis miaj du atestantinoj? Du el miaj studentinoj de la matena kurso. Unu horon antaŭ la geedziĝo, mi demandis al miaj gestudentoj, ĉu iuj liberos ĉirkaŭ la 1-a posttagmeze por helpi min en la urbodomo. Du studentinoj sin proponis kaj mi lastmomento klarigis la celon.

Cetere, mia edzino koreas (kaj ne koreanas!) kaj 20-jaras. Unu jaron antaŭe, ŝi neniel imagus sian edziniĝon sen geedziĝa ceremonio, sen miela vojaĝo al insulo "Cheju-do" (tien iras koreaj novgeedzoj). Kial mi elektis plenŝtopitan labortagon por edziĝi? Kial en Osaka, kvankam mia edzino koreas kaj mi mem estis forironta al Koreio por eklabori? Ludovikito** eble respondus: "Ĉar li estas stranga Franco." Tamen, ne nur pro tiu kaŭzo.

Nun mi instruas la francan en du Pusan-aj universitatoj dum mia edzino studas la francan en Seul-a

universitato. Mi plu vivas unuope dum ŝi plu vivas ĉe sia patro, kiu kompreneble ne scias, ke li fariĝis mia bopatro...

Pusan, 91.10.24 R.-A. C.

* "katakana" estas unu el la 4 japanaj literalsistemoj (ekzistas ankaŭ "hiragana", ĉinaj karakteroj, "kanji", kaj "romaji"). Katakana permesas la transskribon de eksterlandaj idiomoj kiuj nuntempe multas en la japana lingvo.

** Ludovikito estas nuntempa (plej?) eminenta biografo de Zamenhof.

JARFINO EN TOGOLANDO...

La nacia konferenco Togolanda okazis, kaj elektigis ĉefministro kaj la alta konsilantaro de la respubliko. Tiuj devas gvidi la landon ĝis la starigo de vere demokratia reĝimo en Togolando. Jam dum la nacia konferenco oni povis antaŭvidi, ke la transira periodo ne estos facila, ĉar la komunikoj de la konferencanoj montris al ĉiuj la monstron de la togolanda prezidento EYADEMA. Ne, tia homo ne devas esti ŝtatestro. Li ne povis respekti la deklaron de la homaj rajtoj, li kokradis, rabis edzinojn de siaj regatoj, li diigis sin, kaj sin konsideris la plej potenca. Nur li decidis pri la sorto de la lando. Neniu povis protesti, kaj anarkio tie instaligis en nia lando. Jen do la konferenco ĉion malkaŝis, kaj s-ro EYADEMA grumblis. Li ĉiel klopodis fiaskigi la konferencon, ordonante al la militistaro semi timon ĉirkaŭ la konferencejo. La konferenco tamen okazis, kaj starigis poste la transira registaro, kies devoj estas okazigi referendumon por la nova konstitucio, organizi la balotadon por la starigo de la demokratia reĝimo.

La konferenco finiĝis fine de aŭgusto, kaj la transira registaro ekdeĵoris meze de septembro. Tuj buntaj atencoj instigitaj de EYADEMA malordigis la politikan etoson.

* La 1an de oktobro grupo da militistoj atakis la radiostacion de Lome, forpelis ties oficistojn, kaj legis anoncon. Oni povis scii, ke la soldatoj kontestas la decidojn de la nacia konferenco, kaj postulis ke la ĉefministro estu maldungita. Kontaktite de la ĉefministro, la ŝtatestro deklaris, ke li nenion scias pri la evento, kaj promesis starigi komisionon por malkaŝi la puĉistojn. La popolo togolanda

atendadis, kaj, anstataŭ aresti la malbonulojn, alia grupo de militistoj atencis.

* La 8an de oktobro grupo da soldatoj eniris la loĝejon de la ĉefministro armitaj. Ili arestis la gardantojn de la ĉefministro, kaj penetris lian dormejon. Feliĉe, la ĉefministro estis jam informita pri la atenco, kaj li povis kaŝi sin.

* La 3an de decembro la gardantaro de la ŝtatestro kaj aliaj militistoj sieĝis la ĉefministrejon. Tri tagojn antaŭe, ili anoncis la transprenon de la povo far EYADEMA. Ili postulis, ke tiu Eyadema nomumu mem ĉefministron. Ili neniel agnoskas la decidojn de la nacia konferenco. Ili pafis al la ĉefministro, masakris homojn tra la urbo. Fine, ili arestis la ĉefministron, kiun ili kondukis al Eyadema. La soldatoj estas ege postulemaj, kaj firme decidis masakri la popolon.

Jen skize la atmosfero de nia lando. La registaro transira havas problemojn. Oni ne scias, kiam starigos la nova, kiun Eyadema rekomendas. Eble la postaj tagoj tion malkaŝos. Ni povas nun diri, ke la ekpaŝo de la demokratio en Togolando estas ege malfacila. Ĉiuj deziras, ke la diktatoro malaperu, sed la diktatoro ege baraktas por plu-premi la popolon. Vidu mem tiom da personoj, kiujn li masakrigas...

Lome, fine de decembro '91.

Al la kamaradoj el eks-Sovetio

Mi komprenas la avidon de tiuj kamaradoj korespondi tutmonde nun. Sed ili devus kompreni, ke ili ne povas korespondi kun ĉiuj Esperantistoj de la tero. Ke knabo, kiel mi, kiu loĝas en ekzotika tropika insulo, ne ĉiujn leterojn povas respondi, nek ĉiujn petojn plenumi: P.M., P.K., ktp. Ĉefe, ke laŭ miaj konoj, mi estas la ununura esperantisto en insulo el pli ol 1 000 000 da loĝantoj. Mi admonas la k-dojn, kiuj loĝas aŭ deforis-as en tropikaj, aŭ tria-mondaj landoj pli kaj pli redakti artikolojn informajn, ĉefe en revuoj kiel **Laŭte**, ĉar ne estas cenzuro.

Niaj kamaradoj povas meti anoncetojn en la revuoj kun siaj korespondemoj. Krome ili povas sendi informdemandojn al la gazetoj. Respondos tiuj, kiuj kapablas. Ili povas verki artikolojn por informi pri la situacio: ekonomio, politiko, socia vivo, en sia lando. Ĉar eĉ nun kiam ni trovas lavangon da informoj en la gazetaro, ni ne ĉiam estas certaj pri la grado da vero kaj da propagando.

J. Deker

L SP R N T O K O M N M I O

Kiel vi vidas, sen UEA la Esperanto-komunumo estus apenaŭ rekonebla. Ĝi perdus multon. Eĉ sian sencon.

Per membriĝo en UEA aŭ ĝia junulara sekcio TEJO, vi aliĝas al tutmonda reto de pli ol 8 000 individuoj kaj 100 landaj kaj fakaj asocioj. Viaj estas:

La kontaktoj...

La Jarlibro de UEA kaj la Pasporta Servo de TEJO malfermas al vi mondon sen limoj.

La eldonaĵoj...

La plej kompleta Esperanta libroservo regalos vin en 1992 per sia renovigita katalogo de pli ol 3 000 libroj, kasedoj, vidbendoj kaj multe pli.

La kunlaboro...


La revuoj *Esperanto*, *TEJO-tutmonde* kaj *Kontakto* donas unike vastan perspektivon pri nia movado. Jen ĉio por efike aktivi, inkluzive optimismon!

Ne manku al nia komunumo. Aliĝu al UEA.

Sendu viajn kompletajn nomon kaj adreson, profesion kaj naskiĝdaton kun via kotizo (vd. kotiztabelon-sube) al via landa peranto:

Unuĝo Franca por Esperanto (UFE), 4 bis, rue de la Cerisale, 75004 Paris.

MA Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj revuon *Esperanto*), 260 frankoj
MA-T Juna Membro-Abonanto (ĝis 29 jaroj – ricevas ankaŭ *Kontakto*-n), 260 frankoj
MJ Membro kun Jarlibro (ricevas la Jarlibron, sed ne la revuon), 105 frankoj
MJ-T Juna Membro kun Jarlibro (ĝis 29 jaroj – ricevas ankaŭ *Kontakto*-n), 105 frankoj
MG Membro kun Gvidlibro (minimuma kategorio), 45 frankoj
DM Dumviva Membro (ricevas la Jarlibron kaj revuon dum la tuta vivo), 6500 frankoj



Tuaj informoj kaj petoj

GASTON WARINGHIEN

En decembro 1991 forpasis la veterano patriarko de la esperanta beletro en sia 90-a jaro. Tamen ni povas diri, ke li mortis juna, ĉar li konservis ĝis la fino intelektan aktivecon kaj li havis ankoraŭ projektojn en la kapo.

Varingjen prezentigis al ni sub tri ĉefaj aspektoj :

1) la gramatikisto.

Kunaŭtoro, kun Kolomano Kalocsay, de la **Plena Gramatiko**. Tro plena gramatiko, diris LANTI. Kaj oni povas aprobi tiun kritikan juĝon, se oni konsideras la plimulton el la esperantistoj, kies ambicio limiĝas al bona praktiko de la lingvo. Al ili la dek ses reguloj de la **Fundamento** sufiĉas por klara esprimo de iliaj pensoj kaj sentoj, sen harfendaj subtilaĵoj. Sed tiuj, kiuj deziras pliprofundigi sian lingvoscion, trovas en P.G. respondojn al multaj embarasaj demandoj.

2) la leksikologo.

Kunlaborinte kun Grosjean-Maupin, Varingjen poste sin evidentigis inda posteulo de nia granda kaj modesta vortaristo per "**Grand Dictionnaire E-F**" kaj la monumenta P.I.V.

Ni SAT-anoj povas fiere diri, ke sen la iniciato kaj la senlaca instigado de LANTI ne ekzistus P.V. nek P.I.V. Sed ni devas ankaŭ rekoni, ke sen Grosjean-Maupin ne ekzistus P.V. kaj sen Varingjen ne ekzistus P.I.V., kiu estas nun nemalhavebla por ĉiu progresanta esperantisto.

3) la verkisto.

Per sia traduko de la kvarversaj poĉmetoj de la granda irana poeto kaj saĝulo Umar Kajjam kaj per siaj tradukoj de francaj poĉmoj el diversaj poĉmoj (Renesanca, Klasika, Romantika) li montriĝis tre lerta versfaristo. Kiam oni

komparas la francan originalon kun la tradukoj, oni ricevas la impreson, ke tiuj ĉi tute nature fluas el la fonto. Sed provu samon fari el aliaj versaĵoj : tiam vi konstatos, kiel malfacile estus imiti la modelon. Kiel ĵonglisto per ritmoj kaj rimoj Varingjen estis tiel lerta kiel Kalocsay mem.

Sed eble pli rimarkinda estas lia talento en la prozo de la **Eseoj**. Mi ne kapablus detale recenzi tiujn ĉi, mi nur konsilas al vi ilin relegi malrapide, atente, mediteme, ekzemple "**Ni kaj ĝi**". Mi promesas al vi unu el tiuj altaj ĝuoj, kiuj "**fajfas pri la tombo**", kiel diris MISTRAL en la "**Sankta Pokalo**".

En tombo kuŝas nun la korpo senviva de Gastono Varingjen, sed lia spirito daŭre flugas kaj brilas tra liaj verkoj, kaj ĝi longe plu disradiados.

VALO

JUS APERIS

En tiu ĉi rubriko povus aperi recenzoj de verkoj de amikoj de **Laŭte**, se L! disponus pri recenzemuloj... La redaktanto ja ne havas tempon por ĉion legi nek talenton por tion recenzi. Eblas do nur mencii la ricevitaĵajn librojn, eventuale aldonante kelkajn informojn pri la enhavo kaj la mendmaniero. Mi bedaŭras tion tute aparte, ĉar alvenis nova libro de nia amiko Gilbert R. Ledon, "**Al la tero returne**", kiu metas la plej gravajn demandojn por la nuna homaro kaj liveras respondojn. La lasta kovrilpaĝo, pli bone ol mi povus mem fari, jene resumas la enhavon :

"La homo forgesis, ke la naturo ne apartenas al ĝi, sed ke ĝi apartenas al la naturo... Jen la kaŭzo de ĉiuj nuntempaj malekvilibroj, malevoluoj kaj absurdaĵoj : migrado el la kamparo, demografia eksplodo, ekologia dramo, fuŝa ekonomiko kun monkapitalismo kaj kolektivecaj mitoj. Jen la katastrofaj faktoj.

"Sed kontraŭ la fremdiĝo de la homo en sia vivofonto, la naturo, kaj cele al solvo de individuaj kaj sociaj problemoj en homkonforma agado, ĉiu kaj ĉiuj el ni havas almenaŭ unu eblecon por meriti sian rajton pri vivo : ekre-

agi kun responso kaj respekto. Tio signifas, fronte al la nun videbla finpereo de nia kompatinda planedo, la Tero, nia vivmedio, reveni al la tero.

"Sekvas do praktikaj ekzemploj de ĉi tiu nepra kaj urĝa savo, kie la homo memvole povos starigi sistemon de libera kaj individua kooperado... al la tero returne.

"Aŭ ĉu estas jam tro malfrue?"

Mi povas nur rekomendi tiun ĉi libron. Same kiel mi, dediĉu tamen iom el via multvalora tempo por legi ĝin. Legante, nepre notu viajn proprajn ideojn kaj sendu ilin al mi! Konsente aŭ malkonsente kun la aŭtoro, tiu ĉi ekzerco estos tre profitdona por ni ĉiuj!

160 paĝoj bele broŝuritaĵ, kun multaj ilustraĵoj. Vendprezo: ne pli ol 8 us.dol. SAT-broŝurservo volonte peros la mendojn.

Kribo.

"La kormoranoj ankoraŭ ne revenis", romano de Nándor Gion. 116 paĝoj, 60 FF (rabato 33% ekde 3 ekzempleroj). Tiun libron mi ankoraŭ ne legis. Pri ĝi Jak LePuil skribis jenon resume:

"Kiam infanoj desegnas sur la muroj de eks-buĉejo, virbovoj kaj virĉevaloj revivas per la magio de poezio.

"Kiam plenkreskulo konstruas turon por proksimiĝi al la kormoranoj, ni tuj pretas lin helpi, kiel senhezite faras la infanoj de la Buĉejo.

"Kiam Aliaj plenkreskuloj volas kapti kormoranojn por ilin dresi, ni pensas nur pri malkatenigado de l'grandaj birdoj.

"Kiam ni atingas la finon de la libro, ni konscias, ke tiu romano, ja taŭga por gejunuloj, ensorĉis nin per ŝvebanta poezio, per varmega kaj leĝera etoso, per fantasto, fantazio, freŝeco kaj amo al tiuj liberaj birdoj: la Kormoranoj."

Rapida esplorado permesas konfirmi la bonegan kvaliton de la traduko. Tuj kiam eblas, mi eklegos ĝin pli trankvile kaj egoisme, ĉar mi jam eksalivas, leginte la "menumon". Sed tiu diabla forsendenda **Laŭte** momente prokrastas la plezuron.

Eldonite kolektive de KLEKS (PL), La Kancerkliniko (F) kaj E-Societo Subotica (JU), tiu ĉi libro estos facile trov- ebla.



BILANCO DE LAŬTE EN 1991

Abonantaro.

Ni registris pasintjare 418 abonojn (457 en 1990), do regreson je proksimume la nivelo de 1989, ĉefe pro la malpli granda nombro da eksterfranciaj abonoj (177 anstataŭ 206). Tio signifas, ne ke mankas novaj interesatoj, sed ke preskaŭ ĉiuj loĝas en nepagipovaj landoj, kaj ke ni preferis atendi pli helan situacion tie por senriske plivastigi la legantaron.

La jarkolekto.

Ni retrovis en 1991 la regulan 6-numeran jarkolekton, sed rezignis la temporaban pergluan broŝurigon, uzante nur la peragrafan. Sume estis 360 paĝoj (anstataŭ 308) kompanse al la drasta plialtiĝo de la abonprezo (de 40 al 60 FF).

La enhavo restas stampita de granda diverseco. Aperis diskutado pri ekonomiaj problemoj laŭ instigo de amiko Jopo, sekvata de J. Manceau. Amiko Valo restas de ĉiuj ŝatata kunlaboranto. El Afriko Gbeglo Koffi komencis regulan kontribuadon, dum Oksana, superŝutite, rezignis. La ĉenleteroj plu bone cirkuladas, pliriĉigataj de pluraj novaj plumoj. Riveligas la talento de geamikoj Castiau el Belgio, kaj konfirmiĝas la originaleco de R.A.C. nun edziĝinta en Koreio. El Maŭricio kaj Aŭstralio regule alvenas plej seriozaj artikoloj de amikoj Deker kaj Leereveld. Tial estas ne mirinde, ke nia bulteno aspektas alloga al tiuj, kiuj unuafoje malkovras ĝin. Vi ĉiuj ricevu dankojn de la redaktanto!

La spez-bilanco konfirmas la bonfarton de la kaso dank'al la decidita plialtiĝo de la abonprezo. Tiu ĉi tamen restas unu el la plej malaltaj el la tuta E-bultenaro, eble eĉ la plej malalta, se oni atentis la kajerdikecon.

Jam meze de aŭgusto ni eksciis pri la decido de la franca poŝto monpuni la neeŭropajn adresatojn. Prove, por 1992, ni decidis havi diskriminacian abonkoston (80 FF por neeŭropaj landoj anst. 60). Sed ni klopodos, ekzamenonte la situacion de la reabonoj post la januara numero, kompensi tiun "punon" per sendado aviadila, se tio ne riskos endanĝerigi la kasan bonfarton.

Eldonado	13162,50	Abonoj-Donacoj	
Afrankado	5114,67		26279,26
Elspezoj	18277,17		18277,17

Jara saldo 8002,09

Antaŭa saldo	16765,61
Saldo de '91	8002,09
En kaso nun	

24767,70

BILANCO DE SAT-BROŝURSERVO EN 1991

En 1991 la servo ne eldonis novaĵojn, nur reeldonis, sinsekve :

- * Kiel diri? (500 ekz.)
- * Proverbaro Franca-Esperanta (400)
- * Tra la mondo per biciklo kaj esperanto (dikigita eldono) (400)
- * Ne tiel, sed tiel ĉi! (500)
- * Rezolucioj de St Imier (205)
- * El Verkoj de E. Lanti (pli dika) (330)
- * Unu aŭ Nul (400)

... do tamen ne tro pigris...

SPEZARO

Vendoj-Monprovizoj	33184,66	Eldonadoj	11470.
Donacoj	10500 -	Afrankado	1445,10
Diversaĵoj	3853,33	Diversaĵoj	15728,98
Sume :	<u>47537,99</u>	Sume :	<u>28644,08</u>
Jara saldo :	18393,91	Antaŭa saldo :	8343,51
		Nun en la kaso :	<u>26737,42</u>

Bilanco de A.E.R.A. en 1991

Enspezoj : 1535. Elspezoj : 1402,50 Jara saldo : 132,50
 Antaŭa saldo : 5902,87 Nun en la kaso : 6035,37

La enspezoj fontas el kotizoj por membriĝo en AERA kaj el profito devenanta de librovendado. La elspezoj, ĉefe el libro-mendoj.

En 1991 estis registritaj 152 membroj (per rektaj kotizoj, per donacoj, aŭ per monprovizoj A aŭ B).

Ekipado de la Muelejo

Donacoj en 1991* : 8612,60
 Elspezoj : 1 tendo + 4 litoj : 1886. Asekuro : 441. Sume : 2327.
 Jara saldo : 6285,60 Antaŭa saldo : 14397,55. Nun estas en kaso 20683,15 FF, disponeblaj por akiri pli da ekipaĵaro.

* Listo de donacintoj : D.C. 500, J.G. 100, R.C. 100, R.M. 100, L.L. 50, R.A.C. 90, S.A. 100, R.F. 100, H.C. 50, J.S. 80, R.R. 80, J.R.C. 30, F.P. 100, E.D. 2000, J.G. 70, V.L. 50, Y.P. 200, F.G. 100 L.P. 4262,60, M.N. 250, G.L. 100, R.F. 100.

La E-biblioteko ankoraŭ riĉiĝis : amiko E. Dazun alportis al la muelejo 7 kestetojn da libroj, ĉefe el SAT-eldonoj. Li donacis ankaŭ la originalan gipsan buston de Zamenhof skulptitan de Rodo. Ĝi trovis niĉon apud la biblioteko en la kunven-salono.

La ĉefa plibonigo ĉi-jare estas la loĝebligado de 4 dormoĉambretoj. La grava akcidento, kiun suferis Solanĝa, nun prokrastigas progresadon de la laboro. Printempe, ni strebos fini la unuan dormejon kaj daŭrigi la renovigon de la unua etaĝo de la muelejo.

Kristiano.

Solanĝa kaj Kribo plej kore dankas ĉiujn geamikojn, kiuj sendis al ili kuraĝigajn vortojn kaj bondezirojn post la akcidento survoja, kiu trafis ilin apud Limoĝo. Apartan penson ili havas por Isabelle kaj Pierre, kiuj multe helpis per siaj klopodoj kaj multaj vizitoj al la hospitalo. Kisojn al vi ĉiuj!

Disponigado de SAT-broŝuroj al la novaj SAT-anoj de nepagipovaj landoj

Post vizito al la sidejo de la broŝurservo, amiko E.D., konsiderinte la amason da broŝuroj ŝimantaj tie, dum granda plimulto el la novaj SAT-anoj ne povas legi ilin pro neeblo ilin mendi, decidis helpi por disponigi tiun dormantan legmaterialon al niaj orienteŭropaj amikoj. La mono, kiun li tiucele donacis, estos uzata por sendi broŝurpakajojn unue en la urbojn, kie troviĝas SAT-kolektivo. Estus bone, se tie iu responsus por ricevi la pakajojn (ju pli grava la grupo, des pli dika la pakajo) kaj aranĝi la cirkuladon de la materialo inter la lokaj SAT-anoj. Ni do vokas al la SAT-anoj loĝantaj plurope en sama urbo de orienta Eŭropo : elektu inter vi la ricevonton de la pakajo kaj tiu ekskribu al : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE, informante pri la nomoj de la profitontoj. Por tiuj, kiuj loĝas dise en aliaj urboj kaj urbetoj de sama regiono, eble taŭgos aranĝi cirkuladon perpoŝtan. Ĉiuj sugestoj estas bonvenaj.

En la komenco de la "broŝur-disdona" afero, ni ekrilatos kompreneble kun la SAT-perantoj, kiuj eble povos liveri plej utilajn konsilojn, aŭ eĉ transpreni parton de la aranĝado.

Ĉiu helpo per mondonacoj, sugestoj, pretiĝo surloke aranĝi la cirkuladon de la libretoj, ktp, estas bonvena.

SAT-Broŝurservo
 Esperanto - F 47470 Beauville

POR ESPERANTO-ADRESARO

En 195 mi intencis montri, ke Esperanto devas servi al tiuj, kiuj batalas por "Homaranismo", ĉar homaranismo estas vere internacia (kompare kun imperiismo, por kiu la kontakto kun aliaj landoj celas nur profiton de la imperiistoj).

Por ke Esperanto estu je la servo de ĉiuj, kiuj volas uzi ĝin por kontaktoj sen lingvolimoj, tra ĉiuj landlimoj, necesas adresaroj.

... Kiam oni volas kontakti kun homo, kies adreson oni ne konas, escepte de la nomo kaj la urbo, ĝenerale sufiĉas esplori en telefonadresaro. Same, por trovi esperantiston (tio gravas, se oni estas en lando kun nekonata lingvo) oni havos grandan helpon per la adresaro de esperantistoj.

Kiel statas pri la ekzistantaj adresaroj?

1. JARLIBRO DE U.E.A.

Necesas, ke oni aliĝu al UEA. Estas ne nur problemoj pri mono, sed ankaŭ pri membreco. Mi opinias, ke tiu, kiu ne interesiĝas pri la E-Movado, sed nur pri Esperanto kiel tutmonda komunikilo, ne deziras esti membro de asocio, kies vivon li aŭ ŝi ne deziras partopreni.

2. ADRESARO DE S.A.T.

Nur por la SAT-membroj. (Sed ŝajnas, ke mankas en ĝi multaj membroj de laboristaj E-asocioj, inter kiuj estas SAT-Amikaro).

Multaj aliaj provas starigi Tutmondan Adresaron, kiu kompreneble estus sendependa de asocioj. Sed ĉiuj adresaroj havas la saman mankon: ili fariĝus tro dikaj, se estus en ili multaj adresoj.

Mi menciis telefonadresarojn. Kompreneble estus ege malfacile ricevi telefonadresaron de malproksima lando.

Ĉu feliĉe, ĉu bedaŭrinde, la esperantistoj estas tiom malmultaj, ke la afero estas por ili pli facila.

Same kiel ne ekzistas tutmonda adresaro pri telefono, oni starigu esperantistan adresaron laŭ regiono, provinco ktp. Sufiĉas, ke estu unu folio kun dudek adresoj (pli, laŭ la denseco de la esperantistoj). Tiu adresaro estus facile multobligebla. Oni sendu unu ekzempleron al sia(j) asocio(j) kaj al internaciaj. Ĉiuj, kaj la eldonanto de la adresaro kaj la ricevinta asocio, nacia kaj internacia, sendu kopion al ĉiu petanto, pagigante nur la

kostojn. Oni ne devas antaŭvidi gajnon de mono. Pro tio estos permesite al ĉiuj represi ĝin tute libere.

Al tiuj, kiuj timas publikigi sian adreson, mi diros: "Ĉu vi ne disponas pri privata telefono? Aŭ ĉu via adreso ne estas en la adresaro? Ĉu vi neniam ricevis telefonvokon de trudemulo?"

Pri alvoko de esperantisto vi povas ankaŭ elekti, laŭ via dispono, laŭ la problemoj de la petanto kaj aliaj kriterioj, ĉu vi donas telefonon, iun informon, adreson, tradukon aŭ ĉu vi helpas lin aŭ ŝin pli.

Lucien kaj Konstantinka ANGEVIN

Verko de Privat nun trovebla en Esperanto

Estu informataj tiuj, kiujn ĝi povas interesi, ke aperis en Esperanto la libro de Edmond Privat:

LIBERO DOKTRINA KAJ SINCERO

Temas pri prelego, kiun Edmond Privat faris dum la kunveno de svisaj amikoj de la "Amikoj" en Staldeno la 22an de septembro 1940. Oni nomas "Amikoj" la kvakerojn, kiuj estas adeptoj de religio sen klerikoj kaj sen dogmoj.

Tiun verkon de Privat elfrancigis kaj eldonas: eldonejo "Libro-Mondo" (Tomasz Chmielik kaj Paweł Wimmer) strato Jarzebinowa 3/30, PL-21-040 ŚWIDNIK (Pollando) kaj

Kultura Centro Esperantista, strato Postiers 27, poŝtfako 779 CH-2301 LA CHAUX DE FONDS (Svislando)

informis Jakelino

Ni ĵus ricevis:

"Tabuaj vortoj en Esperanto". Aŭtoroj: Hektor Alos, Kiril Velkov. 32-paĝa broŝureto en A6-formato, eldonita en BG. Akirebla ĉe UEA: 6,60 gld + afranko.

Ĝi estas speco de eta suplemento de la nepre havinda "Knedu min, sinjorino", en pli facile enpoŝigebla formato ol ĉi-lasto. Fine troviĝas kelkaj "ekzemploj pri praktika uzado", fakte poemoj jam ie publikigitaj. La vendprezo estas, laŭ mi, iom tro alta kompare al la efektiva valoro de tiu eta spic-rikolto. Domage. Kribo

PS. Bedaŭrinde, jam de longe mi konstatas tro altajn prezojn de E-libretoj. Nun ĉiuj ajn povas fotokopii ion ajn ekster. La vendprezo de ope eldonita broŝuro ne devus superi la sumon elspezotan por ĝin fotokopii mem, ĉu ne? Se ne, tio estas kuraĝigo al "pirataj" eldonoj. Kaj veas nur la monavidaj eldonejoj...

- la venonta numero aperos fine de marto -

Ĝin ricevos nur la abonantoj por 1992. Kontrolu do, ĉu estas aŭ ne kruco en la cirklo malsupre de tiu ĉi paĝo. Se ne estas, dankon, via abono estas jam registrita. Se ja estas kruco, ni ankoraŭ NE ricevis vian reabonon.

Por reaboni :

La en Eŭropo loĝantaj legantoj ĝiru aŭ alĉeku 60 FF, preferere rekte al CERCLE AMICAL ESPERANTISTE DE L'AGENAIS, pĉk-numero : 3371 74 M Bordeaux, aŭ al via peranto. Alilokaj legantoj : 80 FF.

perantoj

Aŭstralio : Vlado KOSEF, 58 Green St., COBAR, NSW 2835

Brazilio : G. LEDON, Rua Maria Aparecida Anacleto 111, 04809 SAG PAULO
aŭ : Brazila Esperanto-Ligo, C.P. 11-1105, 70084 BRASILIA-DF

Britio : Edward OCKEY, Longvida, 15 Upper Pines, Woodmansterne
BANSTEAD, SM7 3PU

Bulgario : Ganĉo DAMJANOV, Makariopolski 7, 6100 KAZANLAK

Germanio : Manfred FUHRER, Am Stadtpfad 11, W-6236 ESCHBORN

Pagi al : Libera Esperanto-Asocio, Sonderkonto Bŭcherdienst
Postĝiro Karlsruhe 2125 01-759, BLZ 660 100 75

Japanio : MINE Yositaka, Kitahama-Kitawaki 29-16, TAKASAGO-si,
Hyōgo-ken, 671 01

Sovetio : Georgij TUJAKIN, 33A-114, Kornejĉukstrato, 127543 MOSKVO

Svedio : Pelle PERSSON, Svartviksvägen 14, 123 52 FARSTA

Ĝenerale peras : SAT, 67 Av. Gambetta, F-75020 PARIS

kaj UEA-sidejo, kie eblas pagi al la konto "ljp-b", indikante ke temas pri abono al **Laŭte**.



Se tie ĉi estas kruco, tio signifas, ke ni ankoraŭ NE ricevis vian reabonon.

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47470 Beauville.
CPPAP n° 58651

**CERCLE AMICAL ESPERANTISTE
DE L'AGENAIS**

F-47470 BEAUVILLE
poŝtkonto : 3371 74 M Bordeaux


kultura asocio laŭ la franca leĝo
de 1901 kun membraro diversnacia
proponas jenajn servojn :



dumonata kultura informilo
kaj esprimilo internacia
(legantoj en pli ol 30 landoj)
kun ties adresaro ĝisdatigata



eldonado de diversaj
manuskriptoj, literaturajoj
kaj lernmaterialo
(jam pli ol 160 titoloj eldonitaj)



Renkontiĝejo "Moulin de Beauville"
(ELDONEJO, BIBLIOTEKO, RESTADO)

ABONILO / MENDILO

sendota al
Cercle amical espérantiste
F-47470 BEAUVILLE

Mia adreso :

Mi subtenas la asocion per membriĝo
kaj partopreno en la decidoj.
Jara kotizo : ekde 20 FF.

Mi abonas al Laŭte!

* por unu jaro (60 FF)

* por pluraj jaroj kiel
monprovizanto **A**
(minimume 200 FF)

Mi abonas al LAŬTE!

+ **la novaj broŝuroj** ekde nun
(minimume 200 FF)
kiel monprovizanto **B**

Mi mendas jenajn broŝurojn
(Mendkodo sufiĉas. Eventuale uzu
la dorsflankon)

Kiam la mendo atingas 120 FF,
libroservo kaj monprovizantoj **A** aŭ **B**
rajtas 20%-rabaton kaj ne pagas
la afrankon.

Alies mendoj :

Se malpli ol 120 FF,
aldoni 20% por la afranko

Mia mendo sumas
(post eventuala rabato aŭ aldono)

Mi deziras monhelpi
por la ekipado de la **renkontiĝejo**
MOULIN DE BEAUVILLE

SUMO :

Mi pagas per poŝtĝiro/bankĉeko/monbiletoj/respondkuponoj
neuzitaj francaj poŝtmarkoj/per mia monprovizo A/B

Alia rimedo :

Dato kaj subskribo :